



3*88.126.

STARTO

ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



nabídka esperantských knih

1) učebnice, slovníky

T. Kilian: ABC mezinárodního jazyka - učebnice pro účastníky letního esp. tábora v Lančově i pro samouky	Kčs	4,-
L. Prachař: Esperanto 1. Učebnice pro děti od 8 let	Kčs	14,-
L. Prachař: Esperanto 2. Druhý díl učebnice pro děti, 19 lekcí, v příloze pracovní listy k zpracování úkolů	Kčs	24,50
J. Cink: Cvičebnice esperanta pro pokročilé.	Kčs	15,-
JUDr. K. Traxler: Česko-esperantský právní slovník. Obsahuje zčásti i slova běžně používaná	Kčs	43,-

2) beletrie

Karel Čapek: Rakontoj el unua poŝo kaj Rakontoj el la dua poŝo. Světoznámé knihy povídek, přeložil J. Vondroušek	Kčs	27,-
Karel Čapek. Brožura s ukázkami děl K. Čapka vydaná k 100. výročí esperanta ve spolupráci se Společností bratří Čapků.	Kčs	5,-
V. Dyk: Ondro kaj drako. Divadelní hra, přeložil Josef Vondroušek	Kčs	8,-
J. Vondroušek: Ĝojoj de mia vivo. Obsahuje ukázky z české literatury (Jirásek, Čapek, Šmíd).	Kčs	16,-
V. Vinař: La skandalo pro Jozefo. Originální parafráze biblického příběhu o Josefovi a Putifarce.	Kčs	16,-
Fabeloj - z angličtiny přeložil M. Malovec. Krátké pohádky vhodné pro začátečníky.	Kčs	10,-
Markoloro - legendy, pohádky a povídky z minulosti i současnosti Vietnamu.	Kčs	6,-
Vizaĝoj - překlad povídek známého jugoslávského spisovatele Ivo Andriće.	Kčs	6,-
Eduard Vilde: Laktisto de Mäeküla - estonský román z konce minulého století, odehrávající se ve vesnickém prostředí	Kčs	15,-

Jam kvardek tri jaroj ni povas vivi kaj labori en

paco.

Desegnaĵo sur la kovrilo : Mirka TOMĚČKOVÁ

el České Budějovice

EL FERVOJISTA MONDO

NI GASTIS ĈE GERMANAJ GEKOLECOJ

Denove finiĝis tempoperiodo en la laboro de niaj esperantistaj gekolegoj en Germana Demokratia Respubliko. En tiu okazo oni aranĝis la jam tradician jarkunvenon, kiun krom la GDR-anaj fervojistaj esperantistoj partoprenis invititaj gastoj, s-ro Joachim Giessner, prezidanto de IFEF /el FRG/ kaj reprezentantoj de la amikaj socialismaj landoj Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando.

Vendrede la 6-an de novembro oni varme akceptis nin en la stacidomo de la bela vogtlanda urbeto Netzschkau apud Reichenbach. Netzschkau estas facile atingebla per rapidtrajno el Dresdo ĝis Reichenbach kaj poste dum kelkminuta veturo per pasaĝertrajno /linioj n-roj 410 kaj 460 de horarlibro de DR/.

Post loĝigo en hotelo "Ratskeller" ni vespere renkontiĝis dum komuna vespermanĝo kun niaj amataj, malnovaj konatuloj kaj iuj novaj partoprenantoj. En amika rondo, en familia etoso la tempo ĉiam rapide forpasas. Kaj tiel okazis ankaŭ dum la interkona vendreda vespero.

Sabate antaŭtagmeze ni post komuna matenmanĝo vizitis la faman fervojan viadukton Göltzschtalbrücke trans la valon de la rivero Göltzsch proksime de Netzschkau. La sperta ĉiĉerono Erich Würker konatigis nin kun multaj detaloj el historio de tiu ĉi plej granda fervoja ponto konstruita el brikoj kaj ŝtonblokoj, 78 metrojn alta kaj 574 metrojn longa, konstruita en periodo 1846 ĝis 1851. Per ĝiaj kvar etaĝoj kaj 81 pontarkoj la ponto similas al iamaĵ romiaĵ akvoduktoj kaj forte impresas la spektantojn. Por konstrui la ponton oni bezonis 26 milionojn da brikoj kaj 64 000 kubometrojn da granitaj kaj grejsaj ŝtonblokoj. Per konstrulaboroj estis okupataj preskaŭ dumil laboristoj, laborantaj dum someraj monatoj ĝis 13 horojnutage. Ne mirige, ke akcidentoj kaj malsaniĝoj abundis kaj ke pli ol tridek homoj perdis la vivon dum tiu konstruperiodo. Nun post pli ol 130 jaroj la viadukto ankoraŭ prezentas sian neŝanĝitan aspekton. Malgraŭ la pli kaj pli kreskanta trafiko ĝi pravas sian plenan taŭgecon kaj ĝian solidecon difektis nek plialtigado de la lokomotiva pezo - de 14 tunoj al 145 ĉe nuntempaj lokomotivoj.

De la fervoja ponto Göltzschtalbrücke la ĉiĉerono gvidis nin al urbeto Mylau, kie ni vizitis kaj trarigardis la bone konservitan ĉasburĝon el la jaro 1180, en la pli postaj periodoj kelkfoje alikonstruata kaj plivastigata. Krom alia ni kun intereso trarigardis la muzeon /parto de la burgo/ kun kolekto de la teksiloj kaj diversaj objektoj uzataj en teksista metio kaj en loĝejmastrumoj de la mezepokaj teksistaj familioj vogtlandaj.

Posttagmeze okazis en hotelo Ratskeller la oficiala laborkunsido, kiun malfermis k-go Achim Meinel, prezidanto de la Fakgrupo

de la fervojistaj esperantistoj en GDR. Post la salutvortoj li faris raporton pri la "10 jaroj de ilia fakgrupo", precipe pri la lastjara laboro kaj kunlaboro kun la Fervojistaj E-Asocioj de najbaraj kaj amikaj landoj Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando. Krom alia li emfazis la gravecon kaj rezultojn de la fakterminara laboro, kies elstaraj agantoj estas H. Theurich kaj H. Jasmann. Kiel aldono de la regule aperantaj Fervojistaj novaĵoj aperis jam pli ol 80 paĝoj de la fervoja terminaro.

La fervojistan E-movadon subtenas la Trafika Ministerio kaj la Sindikato. La membraro kreskis malmulte. Grava daŭra laboro estas la verkado de kroniko de Fervojista E-Asocio en GDR, kiun modele prizorgas s-ino Rita Wirges.

S-ro Joachim Giessner salutis la jarkonferencon en la nomo de IFEF. Krom alia li informis pri la kontaktkunveno de la IFEF-estraro kun reprezentantoj de la socialismaj landoj dum lasta IFEF-kongreso en Katowice, kie oni traktis multajn problemojn kun celo helpi al fervojista E-movado en la socialismaj landoj. Li menciis ankau pri helpo de la IFEF-estraro al Fakgrupo farigi IFEF-membro kaj pri du libroj, kiuj aperis en 1987 kiel kontribuaĵo de IFEF al la Centjara jubileo de Esperanto - "La lastaj infanoj de Oldrovalo" kaj "La fratoj Leonkoro". Ambaŭ libroj valoras, ĉar ambaŭ traktas aktualajn temojn; unu la situacion de tiu ĉi mondo rilate al nuklea milito kaj la reagon kontraŭ tio; la alia internajn timojn de la homo kaj ties supervenkon, homan perfortecon kaj reziston kontraŭ ĝi kaj la lukton inter malbono kaj bono kaj la venkon de la lasta.

Poste alparolis la reprezentantoj ĉeĥa, hungara kaj pola, kiuj transdonis donacetojn.

Post paŭzo kun kaftrinkado ni aŭskultis kelkajn fakprelegojn kun akompano de diabloj pri elstaraj, gravaj kaj interesaj fervojpontoj.

Post la prelegoj kaj komuna vespermanĝo ni pasigis la vesperon per gaja amika amuzado /dum kiu ne mankis eĉ kvizo kun premioj/, babilado.

Alvenis dimanĉo, la lasta tago de nia vizito, samtempe de la tradicia jarkunveno de germanaj gekolegaj. En tiu tago oni antaŭtagmeze organizis komunan ekskurson al la valo de la rivero Weisse Elster, kie ni apud urbeĵo Jocketa vizitis tre similan /kiel sabate/, sed pli malgrandan ŝtonan viadukton trans la rivero Weisse Elster, nomata Elstertalbrücke. Eĉ la vetero favoris kaj ni povis admiri dum kelkaj momentoj eĉ per la varmaj sunaj radioj prilumatajn orkolorajn, riĉarbare kovratajn montodeklivojn ambaŭflanke de la valo, kie la vojo gvidis nin al la valbarajo Talsperre Pöhl, servanta kiel deponejo de la trinkakvo kaj krome kiel ŝirmo kontraŭ inundoj de la rivero Trieb.

Post komuna tagmanĝo en restoracio la jarkonferenco oficiale finiĝis. Tamen kelkaj el ni post adiaŭo kun forveturantaj gekolegoj akceptis inviton de nia ĉiĉerono Erich Würker viziti lian urbon Reichenbach, kie ni interkonatiĝis kun historio kaj ekspluatado de la etŝpura fervoja linio de Reichenbach /Vogtland/ unterer

Bahnhof al Oberheinsdorf, konata sub la nomo "Rollbockbahn". Ĝi apartenas al la plej interesaj faktoj rilate al ĉiuj etŝpuraj fervojoj sur teritorio de la Germana Demokratia Respubliko. Bedaŭrinde la trafiko kauze de la proksima aŭtovojo estis malfunkciigita en 1962 kaj ni spektis nur spurojn de tiu unika kuriozaĵo, inter ili la iaman stacidomon.

Tie ni lastfoje adiaŭis niajn germanajn amikojn kaj gastigantojn por reveturi hejmen al nia streĉa ĉiutaga laboro.

Dankon al vi, niaj germanaj gekolegoj kaj geamikoj pro la invito kaj atentema gastigado.

Jindřich Tomášek



1. La impona viadukto Göltzschtalbrücke en Vogtlando
 2. Parto de la partoprenantoj dum dimanĉa ekskurso tra la valo de la rivero Weisse Elster
 3. Antaŭ la iama stacidomo de la "Rollbockbahn" en Reichenbach. Unua de dekstre la ĉiĉerono Erich Würker.
- Rimarko: Rollbockbahn - fervojo, kiu uzas rulmekanismojn, kiuj portas normalŝpurajn varvagonojn por la transporto sur etŝpuraj trakoj

ESPERANTO · poŝtmarkoj 1987




Dum la Jubilea Centjariĝo aperis en la mondo jenaj Esperanto-poŝtmarkoj: Bulgario - 1, Ĉinio - 1, Germanio - 1 poŝtmarkbloko, Kubo - 1, Malto - 1, Pollando - 1, Surinamo - 3.

Hungario, Koreo kaj Sovetunio aperigis porokazajn jubileajn tutaĵojn kun surprisitaj Esperanto-poŝtmarkoj.

Apud tio oni uzis en la mondo aron da porokazaj poŝtaj jubileaj afrankmaŝinstampiloj, maŝinstampiloj kaj stampiloj.

Bedaŭrinde nia ĉeĥoslovaka poŝto aperigis nenion okaze de la Jubilea Centjariĝo. Sed je dua flanko la ĉeĥoslovaka federala ministerio de telekomunikoj sciigis per sia registrita letero el la 15.10.1987, ke oni aperigos okaze de la Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj PRAGA 88 /26.08. - 4.09./ porokazan poŝtmarkon kun la esperantlingva teksto.

Io simila jam okazis dum la jaroj 1961 kaj 1967 okaze de la Tutmondaj ekspozicioj de poŝtmarkoj PRAGA 62 kaj PRAGA 68. -vlh-



En la tagoj inter la 10-a kaj 15-a de aŭgusto 1987 okazis en Berlin, ĉefurbo de GDR, la XIV-a Internacia Lingvistika Kongreso. Kun plezuro estis akceptita anonco, ke en la oficialan programon de tiu ĉi tutmonda "laborfesto" de lingvistoj estis enkadrita ankaŭ la Ronda Tablo pri Interlingvistiko/Planlingvoj. Ĝian preparon kaj poste ankaŭ gvidon transprenis Dr.sc.Detlev Blanke /GDREA ĉe Kulturligo de GDR Berlin/, d-ro Ronald Löttsch /Centra Instituto por Lingvistiko de la Akademio de Sciencoj Berlin/ kaj dr.sc. Sergej Nikolajevič Kuznecov /Instituto de Lingvistiko de la Akademio de Sciencoj Moskvo/.

En du aranĝoj /la 11-an kaj la 14-an de aŭgusto/ estis en la oficialaj lingvoj de la kongreso prezentitaj jenaj temoj:

Latino kiel lingvo de scienca komunikado dum pasinteco kaj nuntempo.
/prof. d-ro Johannes Irmscher, Berlin, GDR/

Kia lingvo por kia komunikado?
/d-ro Francois Lo Jacomo, Parizo, Francio/

Komputila lingvistiko kaj interlingvistiko
/d-ro Hartmut Sörgel, Berlin, GDR/

Planlingvoj kaj ilia signifo por la lingvistika teorio
/d-ro Sergej N. Kuznecov, Moskvo, Sovetunio/

Lingvotipologio kaj planlingvoj
/d-rq Dan Maxwell /USA/, Utrecht, Nederlando/

Esperanto kiel interlingvo de aŭtomata tradukado
/d-ro Klaus Schubert /FRG/, Utrecht, Nederlando/

Pri la "facileco" de Esperanto
/d-ro Stanislav Košický, Bratislava/

Diakronio en Esperanto
/d-ro Detlev Blanke, Berlin, GDR/

Gramatikaj germanismoj en Esperanto
/d-ro Ronald Löttsch, Berlin, GDR/

La Ronda Tablo estis plia sukcesa prezento de interlingvistiko/esperantologio antaŭ la lingvistika mondo. Ĝian intereson pri problemoj de tiuj ĉi disciplinoj pruvis ankaŭ vigla pridiskuto de ĉiuj prezentitaj temoj ne nur de ĉeestintaj interlingvistoj/esperantologoj, sed. ankaŭ de aliaj lingvistoj.

La enkadrigon de la Interlingvistika Ronda Tablo en la kongresan programon oni povas kompreni kiel rekonon pri la ĝisnunaj rezultoj de interlingvistikaj/esperantologiaj esploroj kaj honorigon de la Centjarigo de Esperanto.

- stk -

Ni recenzas

Miĥail Gorbaĉov: LA SENMORTA GLORAGO DE LA SOVETIA POPOLO. Tradukis V. Arolovič, M. Povorin, V. Seguru, V. Melnikov, redaktis D. Perevalov, L. Novikova, A. Ševĉenko. 32 p., formato 19,5 x 12 x 5 cm.
Eldonejo de Presagentejo Novosti, Moskvo 1985.

La broŝuro enhavas raporton, faritan dum la solena kunveno, kiu estis dediĉata al la 40-jarigo de la Venko de la sovetia popolo en la Granda Patria Milito 1941-1945. Estas aldonita Alvoko de Centra komitato de KPSU, Prezidio de Supera Soveto de USSR kaj Konsilio de Ministroj de USSR okaze de la 40-jarigo de la fino de la Dua Mondmilito sub titolo Al la popoloj, parlamentoj kaj registaroj de ĉiuj landoj.

Ĝenerala sekretario de KPSU Miĥail Gorbaĉov alte taksas en sia parolado, okazinta je la 1985-05-08, la oferojn, viktimojn kaj streĉon de fortoj de la sovetia popolo, kiu en la danĝeraj jaroj de la dua mondmilito sukcesis venke persekuti la faŝistajn malamikojn de Moskvo ĝis Berlino kaj tie hisi la venkan sovetian flagon. Li ne forgesas mencii ankaŭ la helpon de okcidentaj aliancanoj, de la armeoj pola, ĉeĥoslovaka kaj fine ankaŭ de la bulgara, rumana kaj hungara. Fortaj kaj efikaj estis la rezistaj partizanaĵ movadoj en ĉiuj europaj landoj, fare de germanaj faŝistoj okupaciataj. Persista batalo de ĉiuj tiuj fortoj, kune kun superhoma streĉo de laborista klaso interne de Sovetio en fabrikoj kaj sur agroj kaŭzis malvenkon de kruela tirana faŝismo kaj post invado en Francion, kie estis lanĉita la dua fronto fare de okcidentaj aliancanoj, la milito finiĝis per liberigo de ĉiuj okupaciitaj europaj landoj kaj ebligis vojon al nova vivo.

En majo 1945 finiĝis la milito en Eŭropo, sed ĝi daŭris en Azio ankoraŭ ĝis la unuaj tagoj de septembro 1945 kontraŭ la japanaj agresantoj. Sovet-Unio kune kun Ĉinio, Mongolio, Vjetnamio, Koreio, aliaj aziaj landoj kaj Usono venkis ankaŭ la japanan militarismon.

Miĥail Gorbaĉov ne preterlasas mencii la nun furiozantan malvarman militon kaj li ne preteratentas la minacajn voĉojn kaj agojn, precipe de Usono, kiuj jam dum jaroj venenas la internacian etoson en la tuto mondo kaj minacas per detruo de la tuta homa gento.

Antaŭ ol fini sian paroladon, Miĥail Gorbaĉov diris: "Defendi sanktan rajton de la homo por vivo, garantii firman pacon - estas la devo de la vivantoj antaŭ milionoj da pereintoj por libero kaj socia progreso, estas nia komuna devo antaŭ la nuna kaj estontaj generacioj."

La aldonita Alvoko al la popoloj, parlamentoj kaj registaroj de ĉiuj landoj rememorigas la Finan Akton en Helsinki, resumas ĉiujn agojn de Sovet-Unio kiuj pravas, ke milito estas evitebla,

kaj fine ĝi diras: "La kvardekjarigo de la Granda Venko donu novan potencon impulson al komunaj penoj de la popoloj kaj la ŝtatoj direkte al sanigo de internacia situacio, firmigo de la paco. La homaro povas kaj devas fini la 20-an jarcenton kaj enpaŝi la 21-an jarcenton kun certeco pri sia estonto."

Altaĝuloj, kiuj travivis la duan mondmiliton kaj certe dum la tiam tempo aperis en mortdangero - sendube eĉ pli ol unufoje - devas alte taksi la klopodojn de la sovetiaj gvidantoj pri konservado de paco kaj ĉiumaniere subtenadi ilin.

La lingvo de la traduko estas bona, nur kelke da esprimoj estas nebonaj. Ekzemple oni parolas pri "estonto" /pĝ. 3, 20/, sed kontraŭe pri "pasinteco" /p. 20/ kaj pri "pasinto" /p. 28/. Laŭ mia opinio, la formoj kun -eco estas bonaj /PIV, PAG/. "Malfronto" ŝajnas al mi nelogika, eble pli bone konvenus "malantaŭfronta, postfronta teritorio". "Muskola laboro" estas laboro "fizika". La stilo estas bona escepte ekz.: "Per komuna por la tuta popolo strebo venki ..." pli bone taŭgus: "Per komuna strebo de la tuta popolo por venki ..." /p. 8./. Nur unu preterlaso mi trovis en la libro: sur p. 22 "elbas" anstataŭ "eblas".

Utila libro, grava historia dokumento por ĉiuj venontaj generacioj, kiu pravas, ke Sovet-Unio, kun Miĥail Gorbaĉov frunte, vere deziras pacan vivon sur nia "blua planedo" kaj tiel konservi la homan rason kaj ĉion vivantan por eternaj pluaĵ tempoj.

A. Staŭura

Vladimir Ĉerkez: ESPANJA ESPANJA. El la serbokroata tradukis Vesna Skaljcer-Race. Poemo. Eldonis Esperantsko društvo "Radomir Klajic", Beograd, 1986. Formato 21,5 x 11,5 cm, 40 paĝoj nenumeritaj, prezo 8 ned. guld.

La poemo estas dediĉita "Al internaciaj volontuloj de Libero" kaj okupas 23 paĝojn de la broŝuro. Ĝi ne rakontas la historion de la bataloj kontraŭ la faŝista armeo de la diktatoro Francisco Bahamonde Franco, sed ĝi kantas pri entuziasmo, kuraĝo, revoluciaj idealoj, pri suferado de interbrigadanoj, da kiuj batalis en Hispanio 35 mil el 53 landoj. La aŭtoro mem partoprenis la militon kaj la unua eldono de Hispanja aperis en Barcelono en 1938 kune kun aliaj poemoj en volumo "Sango kaj vivo ..." Depost tiu tempo ĝi aperis jam denove sesfoje, en la serbokroata lingvo.

Oni devas admiri la interbrigadanojn, kiuj kapablis riski siajn proprajn vivojn pro idealoj, por forigi ekspluatantajn kapitalistojn, sed vane, vane ...

La poemo estas verkita en liberaj senrimaj versoj, la traduko estas bona, nur ie - tie oni povus diri ion pli klare, ekz. p. 21 /mi mem numeris la paĝojn/: "Ĉiuj restintaj sen patrolando /Ili ĉi ĝin trovos /Kaj ĉiuj homoj sen geamikoj/ Ili ĉi akiros ilin." Al kio rilatas la "ĉi"? Ankaŭ la vorto "Espanja" ne estas klarigita, ĉu eble serbokroata nomo de Hispanio? En la teksto aperadas ambau formoj. La neesperantan vorton "Espanja" legos multaj diverslingvanoj alimaniere, precipe la literon -j-: francoj legos J, angloj

Ĝ, hispanoj H, hungaroj legos ES- kaj germanlingvanoj povas heziti: ĉu legi ES- aŭ ES-? Tial estas tre domage, ke ne estas aldonitaj glosoj, ne nur pri tiu ĉi vorto, sed ankaŭ pri multaj aliaj nomoj, ekz. Dolores Ibaruri /ĉiam tiel, ĝuste Ibarruri/, Kaudiljo /fonetike transskribita titolo de la diktatoro Franco - Caudillo - t.e. gvidanto, simile Duĉe anstataŭ Duĉe /Mussolini/, Firer - Führer /Hitler/, Guernica fariĝis Gernika ktp. Kiu estis ekz. Huan Negrino /p. 21/? Eble Juan Negrín /1889-1956/, ĉefministro de la Popolfronta registaro en 1937-1939, sed devus esti Huan.

La poemo komenciĝas kaj finiĝas per versoj: "La lumo estas pli daŭra ol ombroj /Libero pli kara ol ĉio/ La ŝango pli konstanta ol la fortikaĵoj / Ideoj pri frateco pli fortaj ol gardoj." Ŝajnas, ke la vorto "gardoj" ne estas trafa traduko. Rimarkindaj vortoj /p. 24/: "Vi havantaj nenion / Vi povas nenion ja perdi / Krom la katenoj kiujn por vi la burĝaro portas".

La libreto estas bele ekipita, sur la unua kovrilpaĝo oni vidas desegnon de manifestaciantoj, al kiuj parolas virino kun pistolo ĉezone. Sur komencaj paĝoj estas kapo de Picasso kaj nigra-blanka foto de lia fama bildo Guernica, poste oni povas vidi foton de monumento memore al Internaciaj brigadoj fare de Ian Walters. Ĝi staras ekde 1985 en Londono.

La poemon antaŭiras klarigo pri la bildo Guernica, antaŭparolo kaj informo pri jugoslavaj interbrigadanoj de prof. d-ro Boĵo Popovic, citaĵo el parolado de Dolores Ibarruri kaj eldiro de Ernest Hemingway, sed bedaŭrinde kun nebone tradukitaj komencaj vortoj: "Mortintoj ne devas reviviĝi." Eble "ne povas"? Ĉar sekvas: "Ili nun estas parto de la tero ..."

La libro estas leginda, ĉar ĝi esprimas ne nur sentojn de iu pasiva de-malproksime-vidinto, sed de viro, kiu kuraĝe mem prenis armilon en la manojn kaj ne timis eĉ riski perdon de sia propra vivo.

La poemo pensigas leganton pri tio, ĉu vere iam laboruloj - la plej multnombra klaso en la homa socio - transprenos ĉie regadon super siaj aferoj en siajn manojn? La vojo estas certe longega kaj dornoplana, ĉar amaskomunikiloj de la reganta riĉula klaso intense misinformas kaj trompas la regatojn, kaj tiuj ĉi pli grandparte ne kapablas eĉ imagi al si, ke povus regi homoj el iliaj vicoj kaj havantaj tial moralan devon, sekuri la plej bonajn sociajn kondiĉojn por ĉiuj honestaj homoj.

Adolf Staŭura

SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO. Redaktis Detlev Blanke. Studoj de D. Blanke, E.K. Drezen, M.I. Isajev, U. Lins, S.N. Podkaminer, A. Rátkai. Dua eldono. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝt 1986. Kartonita, 228 p., formato 19,5 x 13 cm.

La libro estas presita laŭ la unua eldono el 1978. Ĝi enhavas enkondukon de d-ro D. Blanke el julio 1977 kaj tri partojn: Historio - 5 sezoj, Ideaĵ fontoj - 3 studoj, kaj Perspektivoj - 2 stu-

doj. Jam pasis do 10 jaroj depost la finverkado de la libro, sed oni trovis nenion novan por aldoni, kvankam traleginto de la libro facile konstato, pri kiuj landoj li eksciis nur tre malgrandan kvanton da informoj. Ankaŭ enestas lingvaj neĝustaj, verŝajne jam el la unua eldono transprenitaj.

En la Enkonduko diras mem d-ro Blanke sur p. 6: "La enhava oferto ŝajne tamen, ni esperas, estas fruktodona, kvankam nekompleta".

Ĉ. Rátkai en "Socialismaj teorioj kaj la internacia laborista asocio pri la universala lingvo" finas i.a. per konkludoj, ke uto-
piaj socialistoj parolis pri iu Universala Lingvo, sed post apero de sciencsocialismaj verkoj de Marks kaj Engels nek tiuj ĉi mem, nek iliaj adeptoj faris ion por aŭ kontraŭ Esperanto.

S.N. Podkaminer en la artikolo "Lenin kaj Esperanto" kritikis ambaŭflankajn asertojn, t.e. ke Lenin mem estis kontraŭ Esperanto, laŭ aliaj asertoj /ekz. latvo Ints Ĉaĉe/ li mem estis esperantisto. Ke Lenin sciis pri Esperanto, tion pruvas la fakto, ke en la j. 1921 "sovietiaj esperantistoj petis la registaron, kies gvidanto estis Lenin, permesi kunvokon de la Tutrusia Esperanto-Kongreso ... ili ricevis aprobon kaj subtenon flanke de la registaro."

D-ro D. Blanke skribas pri "La Internacio de Proleta Esperantistaro /IPE/". Laŭ lia fina resumo "Internacia Esperanto-organizo kun programo kontraŭa al la historia neceso aŭ nereala kaj fantazia /kiel tiu de SAT/, devas degeneri."

Plua studo de d-ro D. Blanke "Pri la kontribuo de la laboristaj esperantistoj por la evoluo de la germana-sovetia amikeco en la tempo de la Respubliko de Weimar" finiĝas per konkludo, ke "La plej multaj laboristaj esperantistoj /kaj tio diferencigas ilin de la tiu-tempaj neutralaj burgaj esperantistoj/ uzis Esperanton kiel utilan rimedon en la politika batalo de la laborista klaso."

Pri "Esperanto dum la Tria Regno" rakontas d-ro Ulrich Lins. Iuj tiamaj germanaj esperantistoj klopodis savi la ekzistadon de la movado en la Regno per tio, ke ili plene konsentis kun la rasismaj teorioj de nazioj. Ĉio estis vana. Ja Hitler menciis en sia Mein Kampf /Mia Batalo/, ke per universala lingvo /ekz. Esperanto/ judoj povos pli facile regi super aliaj popoloj kaj servutigi ilin. Sekve de tio, ankaŭ la novaj komencoj de la germana Esperanto-movado post milito estis tre malfacilaj.

El la studo de Ernest Drezen/latvo, 1892- 7/, koncize titolita "Zamenhof", oni ekscias, ke dum la infanaĵaj jaroj de la Majstro vivis en Bjalistoko 80 % da hebreoj, nur la restantaj 20 % estis rusoj, poloj kaj germanoj. Zamenhof sukcesis plenumi en sia internacia lingvo kvar premisojn: simpligi kaj raciigi gramatikon, konservi internaciecon de la lingvo-elementoj, lasi al la lingvo liberan evoluon sendepende de iu ajn persono kaj pruvi praktikan aplikadon de la lingvo. Dum la 2-a Internacia Kongreso en Genevo en 1906 Zamenhof diris: "Aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj plej ruzaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dissemataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj

gentoj kaj aliaj" /p. 139/. Tiam li opiniis la caran Ruslandon, sed nun - bedaŭrinde - post 80 jaroj - tio validas por multaj mondpartoj.

Ĉ. Rátkai traktas pri "La internacilingva movado kiel kreinto de la Internacia Lingvo". Li venas al konkludoj, ke la idealismaj bazoj de Volapuko kaj Esperanto estis tre proksimaj.

Kaj denove d-ro D. Blanke: "Pri la 'interna ideo' de Esperanto". La radikojn de tiu "interna ideo" oni povas rimarki eĉ en la teksto de la Espero. "Oni ne povas diri, ke certaj ideoj aŭ ideologioj estas nepre ligitaj al tiu aŭ alia lingvo. Tio estas plena fantazia absurdaĵo". /p. 202/. Tamen nia movado estas "principe inklinata kaj malferma al la ideoj de paco, malstreĉigo kaj kunlaboro inter la popoloj" /p. 205/.

M.I. Isajev rezonas "Pri bazaj metodologiaj problemoj en interlingvistiko". Li diras, ke "ni bazas nin sur la marksisma-leninisma tezo pri la tuthomara unueco en estonteco" /p. 211/. Lia rezonado finiĝas per vortoj: "Estu multnombraj naciaj lingvoj! Estu la interpopolaj lingvoj /rusa, angla, franca, hispana, araba, ĉina/, kaj estu ankaŭ la internacia helplingvo!"

La libron finas S.N. Podkaminer per "Socialismo kaj internacia lingvo". Liaj ĉapitroj estas titolitaj: Ideoj kaj ilia efektivigo - Ĉefaj faktoroj - Internacilingva ideo - Internacia lingvo en kapitalisma socio, kaj Internacia lingvo en socialisma socio. Li ne forgesas aprezi Mondpacan Esperantistan Movadon. Ĉar lia studo devenas jam el la j. 1977 /Paco - eldono de GDR/, li povis tiam diri /p. 227/: "La moderna internacia situacio, karakterizata per maltensio de la internacia atmosfero, malpligrandigo de la militminaco, progreso de la ideo de paca kunekzistado ... kreas favorajn kondiĉojn por la sukcesa agado de esperantistoj, malgraŭ la streboj de la reakciularo revenigi la homaron al la 'malvarma milito'. Bedaŭrinde, bedaŭrinde, tiuj ĉi vortoj perdis sian signifon dum la jaroj depost tiam pasintaj, kaj la damokla glavo de tutmonda milita konflikto estas antaŭsignata per plenturne furiozanta malvarma milito."

Legante la libron oni konstatas, ke enestas lingvaj eraroj kaj nekonsekvencaĵoj. Mia artikolo tre plilongigis, se mi volus registri ĉion koncerne tiujn aferojn, mi mencias do almenaŭ iujn malagrablajn specimenojn.

Laŭ PIV oni skribas Sovetio aŭ Sovet-Unio /tiel estas sur p. 133/, ne Sovetunio /p. 6 k.a./ Sampaĝe "eluzi tiun intereson" - ofte uzata ankaŭ en aliaj publikaĵoj: laŭ PIV "eluzi" = difekti per longa uzado, prefere: utiligi. Pli malsupre oni legas pri "Bilddubeno" anst. "dudeno" /t.e. germana vortaro Duden/. Sur p. 7 "verkaĵoj" - "verkoj" sufiĉas. "Germanaj-sovetaj" kontaktoj /p. 8 dufoje/ guste "sovetaĵ" - tiu eraro ofte ripetigas en la libro. "Esperanto estas persekutita de la faŝistoj" /p. 8/ - guste "persekutata" - la afero ATA/ITA evidente ne estas klara ankaŭ al bonaj aŭtoroj. Paĝo 14: "... en sia verkita en 1602 libro Sunŝtato" - pli bone estus: "... en sia libro Sunŝtato verkita en 1602 ..." - "Evoluo ... daŭrigos /p. 19/, guste "daŭros". "Cirkonspektege"

sur p. 22 devus esti klarigita. Sur paĝoj 31-47 /Podkaminer/ oni legas multfoje tiu-ĉi, tiujn-ĉi ks. Kial la kunliga streketo? Li ne estas ankaŭ konsekvenca, ekz. sur p. 33 "Lenina artikolaro", sur 35 "leninan eldiron". Simile "Esperanto" dufoje supre sur p. 37, sed sub tio "esperanto-movado". Tio plurfoje ripetigas, kvankam "Esperanto" estas propra nomo. Sur p. 41 "konduktis sin", ĝuste nur "konduktis". Sampaĝe "Bezugstanna walka" /pole/ anst. "Bezustanna ...". "Neniu, senkondiĉe, privilegiojn al ..." /p. 42/ anst. "Neniujn ...". "Herjkov" sur p. 43 devas esti "Harkov" - en PIV "Harkovo". D-ro Blanke uzadas konsekvence jarindikojn sen antaŭmeti "en /la jaro/", sur p. 50-58 ekz.: "Jen kiel 1912 la bohemia ..."; "1929 1987 membroj de SAT vivis ..." Anstataŭ "nomiĝis" sur p. 52, mi preferus "nomitis". "Ilegalaj" /p. 56/ kaj "legalaj" /p. 57/ laŭ PIV ne ekzistas, oni diru "eksterlegaj", "ne/laŭ/legaj" /p. 109/, "laŭlegaj", sur p. 64 estas ankaŭ "eksterlege". La vorton "organizaĵo" PIV ne konas /p. 59, 60, 63 ktp./, nur "organizo", sed tiu formo ankaŭ en aliaj publikaĵoj estas rara. "Nazianoj" /p. 73/ estas ĝuste "nazioj". Sur p. 125 estas "hebreoj, rusoj, poloj, germanoj", sed sur p. 189: Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj" - do laŭ PIV, sed tiuj formoj majuskle skribitaj estas kontraŭfundamentaj. Drezen diras "pasinto" kaj "estonto" /p. 149/, ĝuste "pasinteco, estonteco" - tiajn formojn oni ankaŭ trovas en la libro. Mi ne scias, kio estas "Kultikaj trajtoj" /p. 169/. Mi ne konsentas kun la formo "Volapuko" kaj ties derivaĵoj, ja en Esperantaj esprimoj ne eblas uzi literojn, en Esperanto ne ekzistantajn - do "Volapuko" ks., t.e. ankaŭ laŭ PIV. Komika estas la eraro sur p. 199: "sukereco" anst. "sekureco". Kaj pri similaj eraroj, nekonskvencaĵoj kaj pretervido mi povus daŭrigi ankoraŭ longe.

Ĝenerale la libro estas instrua kiel historio de pensoj pri universala /t.e. internacia/ lingvo kaj pri Esperanto speciale, precipe en eŭropaj ŝtatoj, kvankam - kiel mi jam menciis - multo ankoraŭ mankas. Legu ĝin ĉiuj, kiuj volas koni faktojn el la historio de Esperanto.

La libro ne estas bindita, nur /malbone/ gluita, tial - bedaŭrinde - dum legado multe da folioj elfalis.

Adolf Staňura (1987)

Attila József: URBORANDA NOKTO. Elektitaj poemoj. Redaktis Vilmos Benczik, ok tradukintoj. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1986. 141 p., 20 x 14,5 cm, kun granda foto de la poeto sur la kovrilo.

La libro enhavas 80 poemojn, inter ili kelkajn en pli ol unu traduko, "Malsato" estas tradukita kvinfoje. La formoj de la poemoj estas buntaj, same ilia enhavo, kiu plej grandparte parolas pri vivo en malriĉeco, plurfoje ankaŭ pri amo kaj pri kara panjo. La socia tembro de la poemoj kaŭzis, ke József ne estis oficiale ŝatata dum la intermilita epoko, kiam li komencis verki jam en 1922 estante nur 17-jarulo, kaj li mem finis sian vivon post 15 jaroj. Li spertis multajn metiojn komencante jam kiel orfa infano, poste li studis eĉ la budapeŝtan universitaton kaj Sorbonon. Ĉiuj malfavoraj spertoj de lia amara vivo speguligas en lia verko, kiu tial sonas

proteste, ja eĉ revolucie kontraŭ la tiama hungara faŝista sociordo. La poemo "Kun pura koro", en kiu li demonstros koleron de 20-jara homo, kiu "tri tagojn fastas tute, jes, ne manĝis absolute" kaŭzis, ke lia profesoro deklaris, ke ĝis li ekzistos, József neniam fariĝos mezlerneja profesoro, ĉar "al homo, kiu verkas tiajn versaĵojn, ni ne povas komisi la edukadon de la venontaj generacioj". Sed la vortoj de la poeto estas vere lirikaj, ne nur ia politika propagando. Poezi-amantoj trovos en la verko tion, kion ili ŝatas.

Sed ankaŭ kelkaj neperfektaĵoj ekzistas. En la kvinfoje enpresa poemo "Malsato" parolas la poeto pri paŭzo dum maŝindraŝado de greno. Ĉe la fino oni legas en kvar tradukoj pri fojnopolvero aŭ fojnodoro, unufoje pri "paŝl-arom". Kiu konas la laboron de terkulturistoj, tiu certe ne kunigos la grendraŝadon kun sekigado de fojno. Ŝajnas, ke ĉi tie nur unu tradukinto /Miklós Fehér/ lerte korektis la eraron de la poeto. Iuj esprimoj ne estas tute klaraj, ekz. sur p. 19: "sur la akvoj jam tagmezumas la nuboj"; sur p. 20: "Kaj kie la blokŝtona forta homo, kiun ne tretas plandoj doloranta?" Se estus "kiu ne tretas per plandoj doloranta", la afero estus klara. "Mankas amatino galantvianda" - sur p. 22, ĉu ne strangaĵo? Samloke: "Kisu min, kaprioletto" - eble "kapreoleto"? Jen mi devas rimarkigi, ke preseraroj preskaŭ ne ekzistas, sed la tradukintoj versaĵne permesis al si multe da licencoj stilaj kaj mi trolongigus la artikolon, se mi volus menci ĉiujn.

La plej multajn poemojn tradukis Imre Szabó - 44, fama Kalo-csay 11. Aldonita estas aŭtobiografio /Curriculum vitae/ kaj postparolo de Vilmos Benczik. Ili ambaŭ tre simpatigas la poeton kaj lian verkon al legintoj de la libro.

Adolf Staňura



KIU KIAM? Interlingvistika memor-kalendaro, ĉeĥoslovaka parto /personoj plus gravaj okazintaĵoj kaj eventoj/. Kompilis Jaroslav Mařík. Artur E. Iltis, Saarbrücken 1987; 32 pĝ, 21 x 14 cm; eldonkvanto 100 ekz., prezo ne fiksita.

Pri la publikaĵo skribas Artur E. Iltis: "Ĉi libreto estas parta realigo de ambicia plano: kompili interlingvistikan memor-kalendaron sub la titolo KIU KIAM? Ĝi devus noti kronologie ĉiujn datojn de naskiĝo kaj morto de famaj esperantistoj kaj aliaj planlingvanoj kaj, en dua parto, alfabetan nom-liston kun la jarindikoj pri naskiĝo kaj morto. Tiu verko, kiam realigita, estus ne nur utila konsultilo, sed povus akriigi la kulturan kaj historian konscion de la esperantistaro."

J. Mařík modele - kaj kiel la unua - plenumis parton de la supre skizita projekto. Lia verketo ampleksas nomaron de agantoj kaj eventojn en la planlingva aktivado, kun la respektivaj datoj, sur teritorio de Ĉeĥoslovakio, ekde la Praslavono /sanktaj Cirilo kaj Metodio, 9a jarcento/, tra Komenio ĝis 1986, kronologie kaj /la personoj/ alfabeto.

La verketo de J. Mařík prezentas laŭamplekse negrandan, sed laŭenhave eksterordinare gravan kontribuon por la serioza studo de planlingvismo sur nia teritorio. Aliflanke ni esperu, ke ĝi instigos kompetentajn fakulojn en aliaj landoj sekvi la bonan ekzemplon kaj kompletigi la aprezindan interlingvistikan projekton.

Vlastimil Novobilský

—por la jubilea fonduso—

František Treger, Hrušovany	Milan Kabeláč, Nymburk
Milan Balga, Břeclav	František Janák, Brno
Pavla Plotová, Úhrčice	Fr. Strumínský, Lešany Břežany
MUDr. J. Hradil,	J. Rýznarová, Pardubice
Mnichovo Hradiště	MVDr. Křupka, Kolín
Max Hillebrand, Jablonec n.N.	J. Popelka, Strání
Margit Zítková, Praha 8	Helena Warlaiková, Skalice
Eva Konečná, Velké Meziříčí	Ing. M. Švancová, Frýdlant
J. Konopásková, Zruč	n. Ostr.
kar. Nývltová, Praha 7	Mikuláš Čekal, Děčín
J. Švéda, Praha	M. Radkovičová, Břeclav



Docentiĝo de d-ro Detlev Blanke

La ministro pri altlernejaj kaj faklernejaj aferoj de GDR la 1-an de februaro 1988 nomumis d-ron sc. Detlev Blanke "Honoraria docento" por interlingvistiko en Humboldt-Universitato de Berlin. Per tio la fako interlingvistiko estas oficiale ligita al la soci-sciencia fakultato de la universitato. La docenteco ebligas certigi sisteman prelegadon kaj instruadon, stimuladon de diplomlaboraĵoj, doktorigaj disertacioj kaj de aliaj universitatnivelaĵoj aktivecoj. Post la Eötvös Loránd-Universitato en Budapeŝto la Humboldt-Universitato en Berlin estas la dua en la mondo, kiu enkondukis interlingvistikon en la rango de docenteco.

D-ro Blanke, kiu ekde la nomumigo ankau apartenas al la altlerneja instruistaro de la universitato tamen restos sekciestro en Kulturligo, kiu plene subtenas lian novan sciencon agadsferon.

Al d-ro Blanke ni sincere gratulas!

ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing. Ivan Špička kaj Ing. Jindřich Novák

ken. Estas necese noti, ke tiu ĉi piedfrapo povas esti tre peza (ĉi tie adiciigās la kineta energio de la kikanta gambo al tiu de la atakant-korpo). Sed el la vidpunkto de la teorio pri la solvo de la sindefendo-situacioj, en tiu ĉi okazo minacas certa danĝero, ke la atakanto povus samtempe piedfrapi. Tial ni la lastan procedon ne tre rekomendas, malgraŭ tio, ke reala danĝero ĉe ĝi estas negranda.

Ekzistas ankaŭ metodoj, kiuj uzas la terenon por sekurigi sin kontraŭ la koinciden atakon, sed tiuj estas jam sufiĉe specialaj. Ni prezentas nur kelke da ekzemploj:

- 7) Por pliproksimiĝo al ni, atakanto devas transsalti iun obstaklon, barilon, akvofosaĵon k.t.p. Finsaltante, li ne povas samtempe piedfrapi (ni supozas tian interdistancon, ke ni ne estas atingeblaj per lia mano). En tiu ĉi momento ni piedfrapu lin.
- 8) Kontraŭulo persekutas nin. Ni subite haltas ekz. tiamaniere, ke ni apogas niajn manojn al arbo aŭ muro kaj piedfrapas dorsen, plej bone la ventron de la alkuranta atakanto. Nia halto estu memkomprene tute neatendita, alie la alkuranta kontraŭulo povas halti kaj prepari sin por defendo aŭ atako. Nia agado estas tre facile realigebla ekz. en arbaro. Se ni estas persekutataj en konstruaĵo, ni haltas ekz. alkurante al bordo.
- 9) Ni staras en ĉambro ĉe seĝo. Atakanto pliproksimiĝas al ni. En oportuna momento ni neatendite ĵetas la seĝon sub liajn piedojn. Senprokraste ni piedfrapas la kontraŭul-talion. Se li klopodas kapti la seĝon per la manoj, ni povas lin bati. Analoge - ekz. survoje tra parko - ni ĵetas kontraŭ la mezon de la kontraŭul-korpo aktotekon kaj poste ni tuj piedfrapas. La kontraŭulo ordinare por la momento antaŭenkliniĝas, kio malaltigas lian tujan atak-kapablon.

Estas necese scii, ke dum batalo niaj subitaj, konvulsiaj movoj ofte kaŭzas, ke la kontraŭulo kondukas analoge. Senmovan kontraŭulon oni iufoje povas tiamaniere impulsigi eĉ al abrupta mov-reago. Tion oni memkomprene ne bezonas. Kontraŭe, se niaj movoj estas trankvilaj, neokulfrapaj kaj relative malrapidaj, la kontraŭulo verŝajne ne reagas laŭ ili. Ni do preparu situacion laŭeble plej neokulfrape kaj tuj poste ni ataku jam fulmrapide kaj peze. Ĉiuj preparaj movoj devas maksimume simili al la normala kondutado de homo en la situacioj, havantaj nenion komunan kun la sindefendo-situacioj. Pri tio oni devas zorgi jam dekomence ĉe lernado de batalaĵoj. Ĉiu devas mem atingi necesan sperton pri aplikado de la priskribitaj metodoj, ne sufiĉas do sole tralegi kaj parkerigi ilin. Ekzercigante kun parulo, ni memkomprene ne frapu lin.

Ĉiun frapon ni haltigu ankoraŭ antaŭ la frapcelo. La priskribitaj metodoj de uzado de batalagoj (la taktikaj direktivoj, principoj,...) estas tre simplaj kaj efektivigitaj eĉ kvazaŭsignale, estas tre efikaj. Sed sen senĉesa ekzerciĝado ilia efikeco rapide malkreskas aŭ nuliĝas. Propra oportuna mensa stato estas memkomprene kondiĉo por sukcesa agado. Kiu timas, kompatas kontraŭulon aŭ ne kapablas decidiĝi, tiu povas facile suferi malvenkon senrigarde al tio, kion li scias aŭ scipovas.

3.4. Tipoj de batalo laŭ pozicio de batalantoj (20 linioj)

3.4.1. Nestar-batalo (97 linioj, fig.41 - 42, t.e. 7 desegnaĵoj)

3.5. Kuliso de la sindefendo-situacio (33 linioj, fig.43, t.e. 3 desegnaĵoj)

3.5.1. Batalo en akvo (84 linioj)

3.5.2. La nokto-batalo (32 linioj)

3.6. Batalo kontraŭ grupon (36 linioj)

3.7. Uzo de pistolo (19 linioj)

3.8. Esti preta estas ĉio ... (40 linioj)

3.9. Reteno de kontraŭulo (53 linioj, fig.44 - 47, t.e. 7 desegnaĵoj)

3.10. Kio estas evitenda

La leganto, kiu nur supraĵe foliumis tiun ĉi libron, povus demandi, kial ni ne priskribis, kiamaniere atakito povas sin defendi, se kontraŭulo tenas ekzemple liajn kolumnon aŭ manon, ĉirkaŭbrakas lian trunkon de antaŭe aŭ de dorse, k.s. Li povus ankaŭ objeti, ke tiu ĉi libro fakte eĉ ne estas lernolibro pri sindefendo, sed male, ke ĝi instrukas, kiamaniere ataki. Tiuj kaj similaj supraĵaj objetoj ne estas konvinkaj. Antaŭ ĉio, oni ne povas opinii, ke batalo komenciĝas en la momento, kiam pugno de atakanto jam proksimiĝas celen kun rapideco 6 - 8 m/s, ĉar tiam ne plu restas tempo por defendi sin. Okaze, ke iu starigus arbitran postulaton defendi sin sole kontraŭ jam estantan atakon, kaj sole efektivan atakon li konsiderus kiel komencon de la sindefendo-situacio, la sindefendo ne havus sencon. Estas evidente, ke komparante la daŭron de rapidaj atakagoj unuflanke rilate la daŭron de la defend-agoj kune kun reagotempo (vidu p.11) duaflanke, la rezulto de interbatalo estus ĉi

tie en la manoj de atakanto. Tiu venkus ĉiam, se li ĝuste aplikus sufiĉe pezan kaj rapidan atakon (frapon). Defendanto ne suferus malvenkon sole tiam, kiam lia kontraŭulo estus tute nekapabla kaj sole klopodus iamaniere teni lin k.t.p. Okaze, ke kvazaŭsignale reaganta defendanto procedas konsekvence laŭ la principo "atendi ĝis la atako fare de kontraŭulo", kiun li poste klopodas vanigi, li transformas tiamaniere sian ekvivalentan situacion en hipoekvivalentan. La taktika regulo, kiu devigas la defendanton fronti sole kontraŭ atakagojn faratajn de kontraŭulo, hipoekvivalentigas evidente liajn ekvivalentajn situaciojn. En ĉi tiu okazo havas avantaĝon eĉ absoluta laiko, kiu lernis nenion, se el liaj instinktaj reakcioj superregas la agrese, kaj kiu sekve de tio senpripense frapadas ĉirkaŭ si!

Ĉi tie ni rememorigas unu el la plej gravaj postulatoj de nia teorio pri solvo de sindefendo-situacioj: la venko de defendanto dependu en la plej granda grado de lia propra kondutado. Ni ĝis nun ĉiam priskribis kiel agu defendanto por maksimumigi sian esperon venki, alie dirite, ni prezentis la instrukciojn, kiel konstrui en star-batalo la hiperekvivalentajn situaciojn (por defendanto). Tial ni ne okupiĝis ĝis nun pri la solvo de la situacioj, kiuj evidente estis ekvivalentaj, ekz. en kiuj estas tenataj niaj kolo, haroj, k.s. fare de kontraŭulo, ĉar se la kontraŭulo havus tempon ataki nin tiamaniere, li ankaŭ estus havinta sufiĉan tempon por frapi nin, kaj eĉ tre fuŝa frapatako povas esti danĝera, se ĝi trafis, eble hazarde, la ĝustan lokon kaj se ĝi estas farita ĝustatempe kaj sufiĉe peze. Finfine, eĉ se la kontraŭulo ne frapis nin ĝis nun, principe nenio malhelpas lin ankoraŭ fari tion. La kontraŭulo, tenanta nian manon, veston aŭ bruston k.t.p. per unu mano, certe povas en ajna sekva momento frapi nin per la libera mano, kiki nin k.s. Koncize, kiel rezultas el nia tuta klarigo, la situacioj, en kiuj la kontraŭulo tenas iamaniere nian veston aŭ parton de nia korpo, estas konsekvencoj de niaj gravaj taktikaj eraroj (estas malobservataj la I-a, III-a kaj IV-a taktikaj principoj) kaj tial ili estas evitendaj. Sed aliflanke estas ankaŭ vere, ke lerninto de la reduktita kurso ne havas sufiĉe da sperto kaj eĉ da scioj por ĉiufoje eviti tiujn ĉi situaciojn. Simile ankaŭ la atakanto plej ofte estas nura amato, ĉe kiu povas aperi, el la instinktaj defend-reakcioj, la pasivdefenda aŭ la rigidiga. En tiuj ĉi okazoj oni povas rebonigi sian situacion kaj venki. Tial ni nun koncize diros ion ankaŭ pri la solvo de tiuj ĉi ekvivalentaj situacioj.

En la ekvivalentaj situacioj necesas tuje (IV-a taktika principo) ataki kontraŭulon per la plej rapida kaj efika batalago, kiun oni scipovas, por eligi lin el batalo. Do venkos tiu, kiu frapas la unua. Ni aplikas ordinare rektmanfrapon; se la interdistanco estas iom pli longa, ni piedfrapu kaj male, se la kontraŭulo estas pli proksime apud ni, ni batas lin per elekstera manfrapo aŭ elekstera tord-brakofrapo aŭ per duona rektmanfrapo. Se la kontraŭulo situas tuŝdistance ĉe ni, estas necese bati lin per nia kapo aŭ piedfrapi (tretegi) lian instepon. Tio estas esence ĉio, kion ni rekomendas el la teknikaj rimedoj. Estas tre grave scii precize la trafendajn lokojn sur la homa korpo. Nur bone lokita kaj peze aplikita frapo estas efika. Sola tepria kono pri la trafendaj lokoj ne sufiĉas, necesas akiri kapablon rapide elekti konvenan batalagon rilate al oportunaj trafendaj lokoj sur kontraŭul-korpo, reciprokaj

pozicioj kaj distanco. Ĉion ĉi ni ellernu kaj regule ekzercu. Ni procedu plej bone tiel, ke nia parulo mem elektu la metodon por kapti nin. Li realigu la kapton kaj restu senmove en rezulta pozicio. Ni trankvile pripensu, kiel, kien kaj per kio frapi. La frapon ni memkomprene nur ŝajnu. Tiun ĉi ekzerciĝon oni poime plirapidigas, la kunulo rolanta atakanton diversmaniere baraktigas la defendanton k.t.p. Fine estu la ekzerc-situacio laŭeble plej simila al efektiva sindefendo-situacio.

Kvara parto - finaj notoj kaj resumo

4.1. Rilato inter sporto kaj sindefendo

La plimulto de sportistoj, kiuj okupiĝas pri la ĵudo, karateo aŭ bokso, opinias, ke, praktikante tiujn ĉi sport-branĉojn, ili aŭtomate scipovas ankaŭ la sindefendon. Tio estas tre disvastigita opinio, malgraŭ tio ĝi estas tute erara. Kion oni bezonas por la solvo de la sindefendo-situacioj scii kaj scipovi? Antaŭ ĉio temas, kiel ni jam diris, pri batalaĵoj, per kiuj oni kapablas sendanĝerigi kontraŭulon, plue pri taktiko kaj fine pri mensa sinpreparo, kiu ebligas, ankaŭ apliki la ellernitajn agojn. Ni haltu ĉe la lasta afero, ĉar malsukceso en tiu ĉi sfero estas ofte fatala por la rezulto de tuta batalrenkontiĝo. Estas ĝenerale konata fakto, ke oni ne povas certigi, ke malvarmsangeco atingita en unu fako aŭtomate manifestiĝas en iu alia. Ni donu ekzemplon: estas granda diferenco, se boksisto batalas en ringo, kie li scias, kion fari, scias ankaŭ, kion signifas movoj fare de kontraŭulo k.t.p., aŭ se li veturas ekzemple per aeroplano, kie lin povas ekregi timo. Solvante la sindefendo-situaciojn kontraŭ batalanton, kiu aplikas kiojn, la boksisto ankaŭ povas perpleksiĝi, ne sciante nun, kiel kondukti en la situacio, kie malsukcesas ellernitaj batalaĵoj kaj taktikaj procedoj. Simile ĵudisto, kiu okupiĝas sole pri la sporta ĵudo, ĝenerale ne estas preparita alfronti kontraŭulon, kiu frapas. Oni certe ne povas serioze supozi, ke la ĵudisto vanigus frapon ekz. per iu parato dank' al tio, ke tiu ĉi defendago estas ĝis nun entenata en la batalkomplekso de la ĵudo. Jes, tiu ĉi batalkomplekso efektive entenas ankaŭ defendagojn kontraŭ kiojn, batojn k.s., sed meznivela sportisto tiujn ĉi batalaĵojn ne scipovas, kio finfine estas, por la rezulto de la batalo, decidanta. La sporta ĵudisto kutimas alpaŝi al kontraŭulo, kapti lian veston kaj prepari kondiĉojn por efektiviĝi everton. Tio estas certe ĝusta en la sporta batalo, sed ne plu en la sindefendo-situacio, ĉar kontraŭulo en tiu ĉi okazo havas sufiĉan tempon por peze frapi.

La sporta karateo, kiu estas laŭ la fenomenologia vidpunkto, plej simila al reala batalo, ne permesas en la sport-matĉoj peze frapi kontraŭulon; la batalaĵojn oni nur ŝajnigas. Tamen en la sindefendo-situacioj devas karateisto fari ion tute malan, do frapi plene forte. Ni vidas, ke la karateo, ĵudo aŭ bokso ne estas en la reala batalo aplikeblaj sportforme. Tio estas grava. Konekse kun alirantaj signaloj, nome, pli facile aperas reagoj, kiuj

36

lingva angulo

Adolf Staŭra

LA TABELVORTOJ

La penso de Zamenhof, krei tabelon de pronomoj kaj adverboj estis ingenia, ĉar ĝi faciligas lernadon de 45, resp. 50 vortoj. La malpli favora flanko de tiu ĉi tabelo estas, ke ĝi impresas kiel verko apriora kaj tiel kvazaŭ substrekes la "artefaritecon" de Esperanto.

Tamen, ĉe pli detala ekzamenado de la vortoj oni venas al konstato, ke ne ĉio estas "prenita el aero", cetere kiel la tuta strukturo de la lingvo bazigas sur io, jam en tiu aŭ alia lingvo ekzistanta.

Prof. Gaston Waringhien ne komentarias en "Plena Analiza Gramatiko" la kvar vicojn de pronomoj, sed pri adverboj li diras en § 88: "Al tiuj radikoj i-, ti-, ki-, ĉi-, neni- li do aldonis elpensitajn silabojn, el kiuj nur unu /-e/ retrovigas kiel libera finaĵo en la lingvo, sed kun alia signifo: en la tabelo ĝi signifas la lokon, dum en la libera funkcio ĝi signifas la manieron."

Analogie oni povas diri pri pronomoj, ke du el la "elpensitaj" silaboj troviĝas en la lingvo: -a kiel finaĵo de adjektivoj, -o kiel finaĵo de substantivoj.

Kiam oni komparas la tabelvortojn kun iliaj ĉefaj ekvivalentoj, oni konstatas, ke iuj demandaj pronomoj kaj adverboj komenciĝas ankaŭ en la ĉefa lingvo je k-. Simile estas ĉe la montraĵ vortoj kun la litero t- kaj ĉe la neaj - precize la samo kun la litero n-: ja la vorto ne estas identa en la ĉefa lingvo kaj en Esperanto, sed en la ĉefaj ekvivalentoj de la neaj tabelvortoj ĝi ŝanĝiĝis je ni-. Ĉe kolektivaj vortoj ekzistas analogio en tiu senco, ke la ĉefaj ekvivalentoj enhavas supersignitajn literojn, en Esperanto ĉ-.

Tial venis al mi la tento, kompari la tabelvortojn kun iuj lingvoj, kiujn Zamenhof konis, kaj jen mi povas prezenti la rezulton. La Esperantaj vortoj estas vicigitaj alfabeto. La ĉefaj vortoj estas aldonitaj nur tial, ke ili "inspiris" min.

	latine	france	ruse	pole	ĉeĥe
kia	qualis	quel	kakoĵ	-	-
kial	cur	-	-	-	-
kiam	quando	quand	kogda	kiedy	kdy, když
kie	-	-	gde	gdzie	kde
kial	quomodo	comme	kak	-	-
		comment			
		combien			
kies	cuius	de qui	-	-	-
kio	quid	quoi	-	-	-

	latine	france	ruse	pole	ĉeĥe
kiom	quot	combien	skolko	-	kolik
kiu	quis	qui	kto	kto	kdo
			kotorij	ktory	ĉterý
kien	quo	-	kuda	dokąd	kam

"Qu-" en la latina estas prononcata "kv", en la franca "k".
 "Cu" en la latina estas "ku", "co" en la franca estas "ko".
 En la rusa kaj pola lingvoj aperas po unufoje la voĉa "g" anstataŭ
 "k". "S" en la rusa "skolko" kaj "do" en la pola "dokąd" havas
 ankaŭ memstarajn signifojn kiel "kun" kaj "en, ĝis", kaj ĉi tie ili
 povas esti konsiderataj kiel prefiksoj. Simile validas por la sekva
 tabelo pri "po/e/-, dla-, pro-, w-, s-, pro-".

	latine	france	ruse	pole	ĉeĥe
tia	talis	tel	takoj	taki	takový
			takov		
tial	-	-	poetomu	dlatego	proto
			potomu		
tiam	tum	-	togda	wtedy	tehdy
tie	-	-	tuda	tam	tam
			tam	tu	
tiel	/ita/	-	tak	tak	tak
ties	-	-	togo	tego	toho
tio	-	-	to, eto	to	to
tiom	tot	tant	stolko	tyle	tolik
	tantum				
tiu	-	-	tot, ta	ten, ta	ten, ta
			to	to	to
tien	-	-	tuda	tam	tam

La negativaj vortoj:

	latine	france	ruse	pole	ĉeĥe
nenia	nullus	nul	nikakoj	nijaki	nijaký
nenial	-	nullement	-	-	-
neniam	numquam	-	nikogda	nigdy	nikdy
nenie	nusquam	nulle part	nigde	nigdzie	nikde
	nullo				
neniel	-	nullement	nikak	-	nijak

	latine	france	ruse	pole	ĉeĥe
nenies	-	-	niĉej	niczyj	ničí
				nikogo	nikoho
nenio	nihil	ne...rien	niĉto	nic	nic
neniom	nullum	-	niskolko	-	vůbec nic
					pranic
neniu	nemo	nul	nikto	nikt	nikdo
nenien	nusquam	nulle part	nikuda	do nikąd	nikam

Al tio oni povas aldoni la germanajn: nichts - nenio,
 niemand - neniu, nirgends - nenie, nimmer - neniam, kaj la anglajn:
 nobody aŭ no one - neniu, nothing - nenio, never - neniam. Similajn
 ekzemplojn oni certe trovas ankaŭ en aliaj hindeŭropaj lingvoj.

La sekva tabelo atestas nur pri ĉeesto de supersignitaj
 literoj en iuj lingvoj, se ne en la ĝusta ortografia, do en la fo-
 netike transskribita formo. En krampoj legu la proksimuman pronon-
 con. La latina lingvo restas "ekster la ludo".

	france	ruse	pole	ĉeĥe
ĉia	-	-	wszelki	všelijaký
ĉial	-	-	z každého powodu	z každého důvodu
			/každého/	
ĉiam	toujours	-	zawsze	vždy
	/tujur/		/zavše/	
ĉie	-	-	wszedzie	všude
			/všende/	
ĉiel	-	vsjaĉeski	každym	každým způsobem
			sposobem	
			/každím/	
ĉies	-	obšĉij	každého	každého
			/každého/	
ĉio	-	-	wszystko	vše, všechno,
			/všistko/	všecko
ĉiom	-	-	wszelka	všchno
			ilość	množství
			/všelkon/	
ĉiu	chaque /šak/	každij	každý	každý
	chcun /šaken/		/každí/	

Koncerne la nedifinajn formojn /ia, ial ktp./, estas interese, ke oni trovas en la germana lingvo irgend ein - iu, irgendwo - ie, irgenwohin - ien.

Jam mi menciis kelkajn finaĵojn en la tabelvortoj. Aldonendas aukoraŭ, ke en la posedaĵ formoj kies, ties ktp. elstaras la anglosaksa - s: Whose hat? Father s hat - Kies ĉapelo? Ĉapelo de patro. Germane: Wessen Hut? Des Vaters Hut. /Ĉu ne estus pli simple, diri Esperante: La patroa ĉapelo?/

Fine mi dankas al miaj amikoj, kiuj helpis min ĉe kompilado de tiu ĉi trarigardo: Miloslav Pastrňák - la latina, ing. Włodzimierz Hebda - la pola, Bahodir Habibov - la rusa lingvo; ties alfabeton mi transskribis laŭ mia propra konsidero.

BLUNG!

J. Kavka

Jen enigma vorto. Ĉu eble ĉina, svahila aŭ afrikansa? Bonvolu iomete pacienci, karaj legantoj, post momento mi eksplikos, pri kio temas ...

Dum mia multjara "esperantumado", plurfoje mi spertis, ke arĥitektoj, budhanoj, cizelistoj, ĉiĉeronoj, dentistoj, ekoloĝoj, filozofoj, gastronomoj, ĝardenistoj k.t.p. /laŭ la Esperanto-alfabeto .../okaze de siaj internaciaj renkontiĝoj klopodis konvinki sin mem, ke la zamenhofa lingvo perfekte taŭgas por esprimi plej subtilajn nuancojn de la homa pensado.

Bonorde, ankaŭ mi estas profesiulo kaj aplikas tiun lingvon en la sferoj tersciencaj. Kvankam mi ne volas kaŝi problemaron de la geologia terminologio, tamen finfine mi ĉiam sukcesis rapide interkonsenti kun miaj diverslandaj fak kolegoj.

Male, en la sfero komunuza /ĉiutaga/, mi travivadis makabran inferon. Nome, antaŭ 29 jaroj venis al mi la freneza ideo, paroli kun mia nove naskita filino sole Esperanton. Mi persistis, nuntempe daŭrigante la dornan vojon kun mia nepo.

Necesis /kaj necesas/ ĉiutage foliumi Esperanto-vortarojn, por ofte konstati, ke la serĉata banalaĵo en ili mankas. Konsilu diablo! Ĉu enkonduki neologismon surbaze de ĝisfunda komparesplo-ro de etnolingvaj ekvivalentoj? Mia biblioteko ja konsistas el sen-nombraj vortaroj, leksikonoj, kompendioj, enciklopedioj, atlasoj, monografioj. Sed tiam povus okazi, ke la idiomo, denaske instruata al mia familian/in/o multrilate diverĝus de alifamilia Esperanto... Mi devas konfesi, ke ne unufoje mi kapitulacis, honte prisilentante la bezonatan vorton, aŭ mallerte priskribante ĝin, aŭ ..., nu, krokodili mi ne tre emis.

Evidente, similan sperton havas ankaŭ alilandaj donkifotoj. Ekz. la nederlando W. Pilger eĉ komencis eldoni specialan bultenon FORUMO DE ĈIUTAGAJ PAROLANTOJ kun la konstanta rubriko "Kiel vi tion diras?" Alia ekzemplo: LA BRITA ESPERANTISTO publikigas serion da artikoloj el la plumo de Don Lord, kiuj okupigas pri la ĉiutaga

Esperanto. Sed post kiom da tempo, la pli aŭ malpli trafaj proponoj registriĝos en vortaroj, nun abunde aperantaj, sed tiurilate mankohavaj?

Mi restu nun ĉe unusola banalaĵo. Promenante kun mia trijara nepeto Jenĉjo laŭroje, mi devas kolektadi ŝtonetojn. Li prenadas kaj ĵetadas ilin ekven, ĉiufoje ekĝojante, kiam la rojakvo supren-sprucas kaj kiam eksonas la profunde basa "blung!" Jes, blung! Ne la zamenhofa "pum!", registrita en PIV kiel "onomatopeo, imitanta la surdan bruon de falo ks: ~! la granda Niko felis en la riveron²."

Se vi ne kredas min, Jenĉjo povas konfirmi, ke neniufoje aŭdiĝas "pum!", sed ĉiufoje la klara blung! Maksimume li povus ne tre volonte koncedi, ke okaze de akvo neprofunda eksonas la germana "plumps!"

Cetera, "pum!" estas la franca "poum!" = onomatopée exprimant le bruit d'un corps qui tombe ... Nekredeble, ke la francoj asertas, ke anstataŭ "poum!" oni povas diri eĉ "patatras!"

Nu, Jenĉjo, diru laŭvere al la legantoj de STARTO, ĉu almenaŭ unusola el la multegaj ŝtonetoj aŭdiĝis al ni "patatras!"? Kapneo. Kaj kiel vi ĉirus tion ĉefe? Nu ja "žbluňk!" /prononcu: jblunk/.

Interkonsentite. La interjakcio estu blung!, la sono substantive blungo, verbe: la ŝtono blungas, adverbe: subakvigis blunge. Do, ni kolektu pli da ŝtonetoj, por blungigi ilin ...

Ho ve, Dio atestu, ke mi neniam emis obei al la nuntempa fimo-do, inundanta la zamenhofan lingvon per fatrasaj radikoj. Sed kion fari, se la ŝtonetoj fakte blungas? Kaj ne sole la ŝtonetoj, ankaŭ la ranoj, fiŝoj, delfenoj, akvosportistoj ...

RONDETA VIVO



Havířov

La 4-an de febr. 1988 rakontis Jarmila Pastrňáková pri la tria etapo de sia vojaĝo en Egiptio "El Luksoro en la Regan Valon". Krom grupanoj ĉeestis la ĉeĥan paroladon ankaŭ 50 metilernantoj de Báňské stavby, al kiuj prof. Pastrňák klarigis la signifon de Esperanto.

AST.

Prostějov

Esperantista klubo en Prostějov rememorigis al logantaro de la distrikto cent-jaran datrevenon de eldono de unua esperanta lernolibro de D-ro Zamenhof. Plej interesaj eventoj fariĝis tutŝtata fotokonkurso en kunlaboro de Distrikta komitato de Socialisma asocio de junularo kaj due ekspozicio de esperantaj korespondaĵoj en kunlaboro de Unuiginta klubo de Revolucia Sindikata Movado.

Kvaronjare estis publikigitaj sciigoj en distrikta ĵurnalo Stráž lidu kaj kvar niaj propagandaĵoj tabuloj diversloke en la urbo informadis pri la atentinda datreveno. En tiu ĉi jaro 1988 direktiĝos tuta nia entuziasmo al fundamentaj lernejoj por informadi kaj interesigi al lernado de Esperanto ĉefe la junan generacion.

B.T.

KONVERSACIO por progresintoj



Lekkvara temo : GEOGRAFIO KAJ HISTORIO

La surface de nia terglobo estas la tera krusto aŭ ŝelo, kies dikecon oni ne konas. Oni ankau nur supozas, kiel aspektas la interne sub tiu ŝelo. Sur tiu krusto situas firmaĵo kaj akvo. La firmaĵo konsistas el pluraj kontinentoj, dum la akvo estas seninterrompa areo. La surface de kontinentoj ne estas plata, estas tie ebenaĵoj, montoj, montkrestoj kaj masivoj. Inter montoj estas valoj. Se ili estas tro longaj kaj mallargaj, ili estas kanjonoj. Abismoj estas fermitaj valoj. Krome oni parolas pri montfendoj, breĉoj kaj aliaj profundejoj. La deklivoj de montoj aŭ valoj estas diverse krutaj. La tuta krusto estas el argilo aŭ stono. Monto, kie estas la stono okulfrappe videbla, estas roko. Vulkanoj estas montoj, kiuj iam sputas ardan lafon el sia kratero. Tio estas erupcio. Oni supozas, ke tiu arda kaj likva maso estas sub la tera krusto. Tie ĝi nomiĝas magmo.

Sur kontinentoj kreskas unuopaj arboj kaj tutaj arbaroj. Inter ili estas herboj kaj floroj, ili estas cefe sur argilo, sed iam eĉ sur stono. Arbaroj en varmaj regionoj estas gangaloj. Nekulturataj herbejoj nomiĝas diverse laŭ kontinentoj stepoj, savanoj, tundroj. La homo komencis kulturi kelkajn plantaĵojn kaj fondis kampojn. Krome la homo zorgas eĉ pri arbaroj kaj kulturadas forstojn kaj boskojn. Alie estas gardenoj kaj plantejoj.

Sur kontinentoj estas riveroj, kie la akvo fluas en fluejo, kaj lagoj, kie plimulto da akvo staras. Apud akvoĵoj estas bordoj, ofte marĉaj kaj kanozaj. Super marĉejoj ŝvebas nekte vaglumetoj. La homo solidigas bordojn kaj konstruas digojn. En akvo estas akvoturnigoj kaj akvofaloj, ie la akvo kirlas kaj plaudas sur rokoj aŭ stonoj. Ie ili formas en la akvo kaskadojn. La akvon oni povas vadi sur bona vadejo, transnaĝi aŭ transiri sur ponto, iam navigas pramo al alia bordo. La riveroj kunigas, kunfluas kaj enfluas fine marojn. La akvo en riveroj kaj lagoj estas dolĉa, sed en oceanoj kaj randaj maroj estas saloza akvo. Oceanoj formas seninterrompan areon. La akvo enranĉigas en la firman teron per golfoj, kie povas esti taŭgaj havenoj por ŝipoj. Mallargaj kaj longaj golfoj kun tre krutaj deklivoj estas fjordoj. Markolo estas akvo inter du firmaj terpecoj. La firma tero penetras en la akvon per duoninsuloj. Kabo estas ekstremo de tia duoninsulo. Se ĝi havas altan pinton, ĝi nomiĝas promontoro. Terkolo aŭ istmo estas mallarga tero inter akvoj. Insulo estas parto de tero ĉirkaŭita tute de akvo. La homo elkonstruis sur riveroj kluzojn kaj baraĵojn por eluzi la energion de la fluanta akvo. La akvo estas necesa por provizado de kampoj kaj gardenoj, por ĉiuj laboroj kaj por mangado. La homo konstruis kanalojn inter riveroj kaj maroj por navigado. En oceanoj kaj maroj ekzistas marfluo, kiuj tramiksas la akvon, sed ili influas

ankau la klimaton pro sia diferenca varmeco. La gravito de la luno kaj ankau tiu de la suno altiras la akvojn de oceanoj kaj la akvo regule torentas al la marbordo kaj for de ĝi. Tiu periodo estas tajdo. La fluanta tajdo estas fluso, ĝin alternas malfluso. La akvo de maroj ĉiam ondigas, sed per vento povas la ondoj esti grandaj, ili kapablas frakasi ŝipojn, la frakasitoj mortas pro subakvigo aŭ pro soifo. La ŝipoj averias eĉ pro aliaj kauzoj. Tamen en oceanoj vivas multaj animaloj kaj kreskas ankau diversaj vegetaĵoj. Oni supozas, ke la unua vivo aperis en la akvo.

La terglobon prezentas en malpligrandigita skalo globuso, la teritorion landkarto aŭ mapo. Por bezonoj de homoj estas tie reto de vertikalaj meridianoj kaj horizontalaj paraleleoj. Centra paraleleo, nula, estas ekvatoro. La paraleleoj al nordo kaj al sudo plikurtiĝas. Gravaj paraleleoj estas tropikoj: norda tropiko de kankro, suda tropiko de kaprikorno. Poste estas polusaj cirkloj kaj ambaŭ polusoj, kie la tera akso eliras el la tero. La polusoj estas numerataj 90 gradoj, kompreneble sur mapoj povas esti eĉ pli detala divido. Dum ekvinokso la suno brilas ofte sur la ekvatoron, dum solstico sur unu el tropikoj. Per tio alternas jarsezonoj, post polusaj cirkloj la suno dum ses monatoj ne venas sur la firmamenton, dum aliaj ses monatoj ne malaperas desur ĝi. Kompreneble ĉiuj linioj fakte ne ekzistas, la homoj certigas ilin per mezuraparatoj, ĉar nur tiel oni povas komuniki sian pozicion precipe sur oceano. Oni certigas numeron de meridiano. Tio estas orienta aŭ okcidenta longitudoj. Poste oni fiksas numeron de paraleleo. Tio estas norda aŭ suda latitudoj. Ĉar la landkarto estas plata papero, sed la tera surfaco estas globusa, da estas necesa certa projekcio, kiu estas dependa de la grandeco, kiun la landkarto prezentu. La desegnado de bonaj landkarto kaj globusoj estas kartografio. Oni uzas diversajn simbolojn kaj signojn, precipe mapoj prezentas nur kelkajn cirkonstancojn. Al meridianoj rilatas zontempoj kaj data linio. La kompasu montras nordon, kiu estas sur landkarto kaj globuso supre, sudo estas malsupre. Ankoraŭ estas oriento kaj okcidento. Tiuj kvar ĉefdirektoj estas kompletigitaj per nordokcidento, nordoriento, sudokcidento, sudoriento aŭ ankoraŭ pli detale. La tuto nomiĝas ventrozo. Tie povas esti eĉ divido en 360 gradoj.

Sur kontinentoj estas suverenaj ŝtatoj, dependaj kolonioj aŭ protektoratoj kaj okupaciataj teritorioj. Inter ili estas limoj naturaj aŭ artefaritaj. La limojn gardas limgardistoj kaj doganistoj. Oni povas transiri la limon nur kun pasporto aŭ alia dokumento en precizaj limpasejoj. El varoj transportataj trans limo estas pagataj doganoj.

La teritorio de ŝtato estas dividata plu en provincoj, tie logas plej ofte unu nacio, gubernioj, departementoj, regionoj, distriktoj, civitoj. Tiu administra divido estas dependa de la grandeco de ŝtato. Civilizitaj ŝtatoj konas bone la tutan teritorion kaj havas detalajn katastrajn mapojn.

Maniero de la regado en ŝtato estas reĝimo . Dum la historio aperis pluraj regimoj . Komence ekzistis tiranio kaj despotio, kiel ŝajne regis unuopulo . Sed fakte tiu monarko aŭ suvereno havis konsilantaron , el kiu poste evoluis kongresoj , senatoj kaj parlamentoj . Se tiuj parlamentoj forigis precipe la heredan funkcion de monarko , la ŝtato estis respubliko . Sed pli grave estis , kiu povis esti deputato de parlamento . Nur en demokratio ĉiuj ŝtatanoj havas samajn rajtojn , do ili voĉdonas kaj elektas tiel deputatojn dum balotado el kandidatoj , kiuj estis de partioj , grupoj , tavoloj , kluboj , klasoj kaj aliaj societoj proponitaj . Nuntempe ĉiuj ŝtatoj celas al egalrajteco de ĉiuj ŝtatanoj , do unuopaj diferencoj en titoloj kaj nomoj ne estas gravaj , sed grava estas la grado de tiu evoluo , kiu iam iras eĉ reen . Tial ĝis nun ekzistas monarkioj , regolandoj , dukejoj , grafejoj , imperioj kaj aliaj , sed ankaŭ respublikoj , en kies estraro estas prezidento , sed ankaŭ diktatorejoj , kiam certa kliko ekkaptas potencon kaj nomas diktatoron . Politiko estas arto pri regado en la ŝtato , diplomatio estas arto kaj kutimoj en la kontaktoj inter ŝtatoj . En nunaj ŝtatoj interdecidas parlamento pri konstitucio kaj leĝoj . La registaro konsistas el ĉefministro kaj ministroj , kiuj regas unuopajn ministeriojn . La ŝtatestro reprezentas la ŝtaton , akceptas diplomatojn kaj ambasadorojn de aliaj ŝtatoj .

La polico protektas la ŝtatanojn kontraŭ malbonaj agoj kaj krimoj . Juĝistoj kondamnas krimulojn en procesaj debatoj antaŭ la tribunalo . Tie estas prokuratoro , kiu akuzas , akuzato kun sia advokato , juĝistoj , iam eĉ ĵurio , kaj atestantoj . Laŭ la verdikto de la tribunalo estas la akuzito punata per monpuno , en malliberejo aŭ prizono , en gravaj kazoj ekzekutita . La krimuloj ne obeas leĝojn , spionoj malkaŝas sekretojn de la ŝtato , konspirantoj kaj komplotantoj strebas ŝanĝi la reĝimon . Iam ili ribelas kun armiloj kaj preparas revolucion . Maroderoj estas elsendataj el aliaj ŝtatoj por instigi komplotojn kaj ribelojn , kontrabandistoj ne volas pagi doganon . Policano sen uniformo estas detektivo , gendarmo estas ie speciala polico . Soldato lernas manipuli kun armiloj por defendi la teritorion kontraŭ atako de alia ŝtato , kiu tiel komencas militon . En kazerno loĝas ekzer-cataj soldatoj , aliaj estas hejme kaj en kazo de mobilizo venas en kazernojn . La tuto estas armeo , ie oni nomas ĝin milico . La milito konsistas el pluraj bataloj , intertempa paŭzo inter bataloj estas armistico .

Ŝtatoj havas simbolojn . La flago flirtas sur masto , la himno estas ludata aŭ kantata , la emblemo estas interalie stampata . Inter si konkludas ŝtatoj kontraktojn , konvenciojn kaj paktojn . Patriotoj nomas sian ŝtaton patrio aŭ patrolando . Pejzaĝo aprezata laŭ vidpunkto de libera aŭ facila movado estas tereno . Ĵipoj estas veturiloj , kiuj bone moviĝas en tereno .

La partoj de la ŝtato havas sian aŭtonomion . Civitana administrado estas en diferenca grado , en la mezepoko temis pri feŭdo , ekzistis feŭduloj kaj vasaloj , nobeloj kaj servutuloj .

GRAMATIKO : 1 Nomu dekkvin ŝtatojn de la mondo , skribu ion pri ili kaj atentu la sufikson . Kion vi scias pri sufiksoj de ŝtatoj ? 2 Elnomu dek pasivajn participojn elprenitajn el tiu ĉi temo kaj uzu ilin en frazoj

STILO : 1 Skribu por eksterlanda amiko informon pri via ŝtato 2 Priskribu aŭ desegnu la simbolojn de via ŝtato . Ĉu la himno estas tradukita en Esperanto ?

DEMANDOJ : 1 Kiuj maroj aŭ oceanoj estas plej proksimaj al via lando ? 2 Kiaj estas la limoj de via lando ? 3 Kiel granda estas via lando ? Diru la nombron da loĝantoj kaj la areon en kvadrataj kilometroj 4 Diru la geografian pozicion de via urbo /eĉ nur proksimume/ 5 Kiujn vulkanojn vi konas ? 6 Ĉu vi konas estingiĝintajn vulkanojn ? 7 Kiuj estas konataj kaboĵ ? 8 Kiaj estas titoloj de ŝtatestroj ? 9 Kia estas la administra dividado en via lando ? 10 Ĉu vi konas aliajn nomojn de parlamentoj en kelkaj ŝtatoj ? 11 Ĉu vi jam banis en la maro aŭ ĉu vi eĉ vojaĝis per marŝipo ?

Josef Chvosta

Jablonec nad Nisou

La klubaj kunvenoj okazas ĉiam lunde je la 19a horo en la klubejo en DŮM VZDĚ-LÁVÁNÍ KaSS, 3-a etaĝo. La Domo de edukado situas apud la teatro - proksime de urbo-centro. Je dispono estas diversaj Esperanto-gazetoj kaj revuoj kaj eblas pruntepreni librojn el la kluba biblioteko. Kurso por komencantoj kaj aparta konversacia kurseto funkcias ankaŭ lunde ekde 17a horo.

Oni preparas serion da prelegoj kaj raportoj, ekzemple kun profesoro Jaroslav Hradecký pri E-medaloj kaj plakoj, kun estraro de distrikta packonsilio pri nia komuna porpaca aktiveco, kun ĉefredaktoro de distrikta ĵurnalo Noviny Jablonecka kaj kun reprezentantoj de najbaraj esperantistaj kluboj kaj rondetoj el Železný Brod, Liberec, Mnichovo Hradiště, Praha kaj aliaj. Kurso por komencantoj daŭras ekde septembro en la klubejo kaj ankaŭ por infanoj kaj gestudentoj en la urba domo de pioniroj. (Informilo)

N á c h o d

La klubaj kunvenoj okazas ĉiun duan kaj kvaran vendredon en monato je la 18a h en klubejo NKS. En kadro de "Klubo de internacia amikeco" oni aranĝis prelegon pri Esperanto al 110 lernantoj de 3-a klaso de baza lernejo. Al kurso aligis 20 komencantoj. Krome oni aranĝis prelegojn kun lumbildoj "Kun Esperanto tra la vasta mondo" kaj ekspozicion okaze de la centjariĝo de Esperanto (pli ol mil vizitintoj). En kastelo Náchod kaj fortikaĵo Dobrušov, kiujn ĉiujare vizitas cent mil turistoj, oni instalas specialajn informtabulojn. En aliaj lokoj oni pendigis asociajn afiŝojn (en fabrikoj, lernejoj, banko, vendejoj ktp.). (Informilo)

O p a v a

La rondeto funkciis en la uzina klubo Ostroj Opava kiel rondeto de la Esperanta konversacio, kiun partoprenas esperantistoj el Opava kaj ĉirkaŭaĵo kaj el Krnov. Regulaj kunvenoj okazas ĉiam marde je la 18.45 h. Oni konversacias laŭ la libro de M. Boulton "Faktoj kaj fantazioj". Por la publiko oni aranĝis ekspozicion "Esperanto kaj literaturo" en muzeo de P. Bezruč, kurson por komencantoj kaj prelegojn pri Esperanto (en muzeo en Český Těšín, en la numismatika societo en Opava, por laboristaj metilernantoj - sume por 170 personoj). Vicon da informoj oni aperigis en lokaj ĵurnaloj Nové Opavsko, Kulturní měsíčník, Mladý svět, Nová svoboda k.a. Ing. Kočvara estis trifoje intervjuata en la radio. La rondeto aperigis afiŝon al la ekspozicio, prospekton kaj bildkartojn al la centjariĝo. (Jarraporto)

ĈAPITROJ el INTERLINGVISTIKO

5. VOLAPUKO

La unua artefarita lingvo, kiu akiris rimarkindan socian disvastigon, estis Volapuko /volapük, 1879/ de la katolika prelato Johann Martin Schleyer /1831-1912/. La volapuka movado akiris sian kulminon en 1889. Dum la dek jaroj per strebado de la movadanoj estis formita literaturo instrua, propaganda kaj eĉ beletra, konsistanta tiutemple el pli ol 400 titoloj. Aperadis 26 volapukaj gazetoj. Kursojn de la lingvo en diversaj landoj trapasis ĉirkaŭ 210 mil homoj. En 696 lokoj /urboj kaj vilaĝoj/ en 39 landoj de la mondo posedis 2 015 diplomitaj volapukistoj la rajton instrui ĉi tiun lingvon. En la listo de landoj laŭ la nombro de volapukistoj okupas la unuajn lokojn Germanio, Francio, Aŭstrujo-Hungarujo, Italio, Nederlando, Rusujo kaj Usono, do Eŭropo kaj Nord-Ameriko. Sed reprezentitaj estas ankaŭ landoj de la Latina Ameriko /Brazilo, Meksikio, Argentino, Kubo, Ĉilio/, de Azio /Turkio, Ĉinio, Japanio, Vjetnamio/, de Afriko /Egiptio, Alĝerio, Madagaskaro/, de Aŭstralio kaj Oceanio /Havajaj insuloj/. Spite ĉi tion estis Volapuko elpuŝita de Esperanto. Ĝia malvenko estis tre instrua por pluaj lingvoplanado.

Schleyer faris multajn erarojn, ne tiom lingvistikajn, kiel eksterlingvaj. Li ne komprenis la socian karakteron de lingvoj kaj neceson de ilia socia evoluo. Volapukon li konsideris sia privata posedaĵo; pri ĉiuj ŝanĝoj, korektoj kaj pliriĉigoj li volis decidadi mem kaj sola. Malgraŭ tio li esperis, ke Volapuko elpuŝos ĉiujn naciajn lingvojn kaj iĝos unu sola lingvo sur nia planedo. Krom la bazaj vokaloj A E I O U li uzis ankaŭ la germanajn vokalojn Ä Ö Ü, kiujn krom la germanoj neniu scias bone prononci kaj distingi per orelo. Aliflanke li eksciis, ke la ĉinoj ne kapablas elparoli R, tial li ĉie anstataŭigis ĝin per L. La esprimojn li ĉerpis precipe el la germana kaj la angla, sed li deformis ilin en tute novajn vortojn: vol = mondo /world/, söl = sinjoro /sir/, bil = biero /Bier/, mel = maro /Meer/, pük = parolo /speak/, veg = vojo /Weg/, Julop = Eŭropo /Europe/ ktp. Deklinacion kaj konjugacion li faris precipe per sufiksoj /buk - libro, buka - de libro, buke - al libro, buki - libron; binob - mi estas, binobs - ni estas, binol - ci estas, binols - vi estas, binom - li estas, binof - ŝi estas, binos - ĝi estas, tinoms/binofs - ili estas/, kio donas al la volapukaj vortoj kaj frazoj neeŭropan aspekton /Limdikosi kostom met klöfa at? - kiom kostas po metro da tiu drapo?/. Ĝuste la neeŭropan aspekton li opiniis granda avantaĝo, kiu egalrajtigas ĉiujn naciojn kaj ne restigas al eŭropanoj maljustajn privilegiojn. Kvankam tiu konkludo havas sian pravigon, ne eblas tamen miri, ke ĉe la eŭropanoj pli poste venkis tiuj lingvoprojektoj, kiuj respektas la internaciajn vortojn. Alia grava eraro de Schleyer estis uzo de multaj verbomodoj laŭ germana modelo; kiujn krom la germanoj neniu scias korekte apliki en la praktiko.

6. ZAMENHOF

Ĉar estus senbezone rakonti al esperantistoj pri Esperanto, ni tuj priskribos ĝian reformon, la lingvon Ido. Tamen pri la aŭtoro de Esperanto necesas precizigi kelkajn informojn.

Ludoviko Lazaro Zamenhof /1859-1917/ originis el juda familio, kiu hejme parolis la rusan lingvon. Kiam li naskiĝis, li ricevis la judan nomon Lazaro /ruse Lejzer/ kaj kun tiu nomo li travivis sian infanaĝon kaj juneco. La medicinon li studis en Moskvo, do ruslingve. Post la finstudado li edziĝis kaj ekloĝis en Varsovio. Li poligis kaj sian nomon Lazaro li anstataŭigis per la nomo Ludoviko. Lia familia nomo korekte aspektis Samenhof, sed sub influo de Esperanto li skribis Zamenhof. Ĉar ankaŭ lia frato, doktoro Leo Zamenhof, verkis esperantlingve, por diferencigi iliajn subskribojn Ludoviko uzis en siaj libroj nomon L.L.Zamenhof - ne plu eblas decidi, ĉu tio signifas Lazaro Ludoviko aŭ Ludoviko Lazaro, ĉar li mem evitis decidon uzante nur la inicialojn. Lia patro, mezlerneja profesoro de la rusa lingvo, nomiĝis Marko, tial la ruslingvaj gesamideanoj nomas Zamenhofon ankaŭ Lazaro Markoviĉ aŭ Ludoviko Markoviĉ kaj prezentas lin kiel rusan kuraciston, kio estas ankaŭ pravigebla. En lia personeco renkontiĝas judeco, ruseco, poleco kaj ankaŭ germaneco, kiel pruvas lia germana familia nomo, do ĉiuj kvar naciecoj, vivantaj antaŭ cent jaroj en Bialystok.

Miroslav Malovec




Esperanto-Klubo Vítkovice

Pli ol 40 geklubanoj, gastoj el proksimaj kluboj kaj ankaŭ el ĝemeliga klubo el Žilina ĉeestis jarkunvenon, kiu okazis la 20-an de januaro 1988 en "Společenský dům" en Vítkovice. Post inaŭguro, farita per majstra violona ludo de Pavla kaj Alžběta Rablová, parolis prezidanto de la klubo Drahomír Kočvara, kiu esprimis, en la nomo de la komitato, opinion, ke malgraŭ kelkaj malfacilaĵoj la jaro 1987, jaro de 100-a datreveno de la lingvo, estis sukcesplena. Por siaj 110 geklubanoj, kaj ne nur por ili, la klubo aranĝis dum la jaro 34 prelegojn kaj interbabiladojn. Popularaj estas ekakursoj kaj aranĝoj kun turismo, sciiga kaj amuza enhavo, kiujn la klubo organizis dum semajnfinoj. Naŭfoje dum la jaro eldonis komitato kluban cirkuleron por informi la membrojn. Por informi la publikon, la komitato zorgis pri tri montrofeneistroj kaj aperigis 16 artikolojn kaj sciigojn en ĵurnaloj Nová Svoboda, Ostravský večerník, Jiskra, Mladý Vítkovák kaj Svět v obrazech. Okaze de la 100-a datreveno de Esperanto la klubo eldonis leterpaperojn kun terglobo kaj por ke oni povu propagandi kursojn por komencantoj, oni eldonis belajn afiŝojn laŭ propono de s-ano Morisák. Dum jaro 1987 la klubo aranĝis du kursojn por komencantoj, kurson por progresintoj kaj du kursojn por infanoj.

Post organizaĵa aferoj ekparolis en kadro de diskuto ankaŭ vicprezidanto de ĈEA Ing. Vlastimil Kočvara kaj prezidanto de ĝemeliga klubo el Žilina Ing. Juraĵ Gondžúr.

- suR -



KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

E-lernolibrojn, vortarojn, beletron, jarkolektojn de E-revuoj mi malkare vendos /liston mi sendos/. Mi acetos Starton n-roj 71 - 76, revuon Esperanto 1976/1, 1977, 1978, 1980/1, 1985/10, 1986/6, der esperantist 1 - 62, Interlingvistikan informan servon 1983/3, 1984/1 k. 4, 1985/1-4 kaj publikaĵojn en kaj pri aliaj projektoj de internacia lingvo. Ankaŭ E-postmarkojn, tutaĵojn kaj ŝtampojn. Adreso: Dr. J. Jermář, Jablonová 43, 106 00 Praha 10, Ĉeĥoslov.

Militinvalido, granda kolekto de bildetoj kaj bildkartoj de ĉiuj specoj kaj formatoj el la tuta mondo, ankaŭ de propagandaj materialoj, presaĵoj, prospektoj pri la E-ago antaŭ la 2-a mondmilito kaj post ĝi. Ankaŭ fotojn de memorlokoj, monumentoj, geesperantistoj vivantaj kaj ankaŭ de la pereintaj dum la milito, klubejoj, domoj kaj publikaĵoj propagandaj aktivecoj okaze de la Centjarigo de Esperanto. Rekompence mi sendos 1. fotojn pri la vivo kaj aktivecoj de esperantistoj en Prago, 2. kopiojn de subskrib-listoj okaze de la Centjarigo de Esperanto, 3. fotojn de memor-tilio kaj memor-ŝtono kun surskribo "100 jaroj de Esperanto kaj 85 jaroj de la E-Klubo en Prago". Mi ne havas tempon por korespondado kaj intersangado. Adreso: B. K. Fišera, Norská 3/520, 101 00 Praha 10 - Vrřovice, Ĉeĥoslovakio.

Esperantista kolonieto "Verda Familio" invitas al senkosta daira logado en vilaĝaj dometoj kun gardenoj 10-15 unuopulojn, resp. 5-6 geedzajn parojn, kiuj simpatias kun reformita, sana, natur-konforma, senvianda vivmaniero. Oni pagos nur por la elektra energio, hejtado, imposto kaj asekuro. Informojn petu de Ernesto Vana, 962 71 Dudince, Ĉeĥoslovakio.

36-jara oficistino interesigas pri turismo kaj literaturo. Adreso: Anna Pikulska, ul. Wałowa 5 A, Bełżanica, 44-362 Rogów n/Olż, Pollando.

Instruistino pri biologio, kiu instruas ankaŭ Esperanton en agrikultura mezlernejo, sercas kontaktojn kun aliaj agrikulturaj mezlernejoj (aŭ ĝenerale - mezlernejoj) kie oni instruas E-on aŭ gvidas E-rondon. Adreso: Elżbieta Abramowska, ul. Słowackiego 2 A - 32, 86-100 Świecie, Pollando.

22-jara dancistino en folkloro grupo interesigas pri turismo, literaturo, sporto, folkloro, kolektaĵojn vestitajn en folkloraj vestoj, postmarkojn, bildkartojn, ŝatas vojaĝi kaj amas florojn en florpotoj kaj bestojn. Adreso: Małgorzata Arciszewska, Osrodek Szkolenia Kadr, 21-113 Piaseczno k/Lubartowa, woj.lubelskie, Pollando.

17-jara lernanto interesigas pri batalartoj de Ekstremoriento (ekz. karateo, judo, kendo k.a.) kaj pri Esperanto. Povas intersangi postmarkojn, bildkartojn, E-librojn, E-glufoliojn kaj ikonetojn. Adreso: Andrzej Sapieha, ul. Okrężna 28/23, PL-66-100 Sulechów, Pollando.

28-jara laboristo interesigas pri muziko, sporto, filmo, filatelo kaj turismo, kolektaĵojn postmarkojn, ilustritajn revuojn kaj sondiskojn. Adreso: Jerzy Kowalski, str. Obr. Pokoju 165/10, PL-67-200 Głogów, Pollando.

18-jara lernanto interesigas pri turismo, sporto, geografio kaj teatro, kolektaĵojn postmarkojn kaj monerojn. Adreso: Wojciech Leitloff, str. Sienkiewicza 6m.10, 90-113 Łódź, Pollando.

25-jara instruisto en elementa lernejo interesigas pri fotografado, turismo kaj literaturo. Adreso: Lucjan Kołodziejewski, PL-32-825 Borzecin Dolny 374, Pollando.

50-jara abelisto kaj ĉinĉilobredisto interesigas pri fotoarto, literaturo kaj libroskribado. Adreso: Zbigniew Małyszko, Zajecza 17, 15-531 Białystok, Pollando.

52-jara instruistino interesigas pri literaturo kaj turismo. Adreso: Marianna Mól, ul. Wolbromska 87, PL-32-313 Bydlin, Pollando.

Korespondi deziras: Krystyna Nowicka, ul. Łukaszyńska 11/28, 21-500 Biała Podlaska, Pollando.

24-jara studento havas hobiajn: historio, historio de belartoj (precipe arkitekturo), kulturo de diversaj nacioj kaj fremdaj lingvoj. Krom esperanto li povas skribi ankaŭ germane aŭ pole. Adreso: Piotr Cymerman, Marianów 11, PL-98-105 Wodzisław, Pollando.

24-jara flegistino interesigas pri turismo, literaturo kaj medicino. Adreso: Barbara Lesień, ul. Niepodległości 30/2, 70-412 Szczecin, Pollando.

23-jara nova esperantistino interesigas pri turismo, literaturo kaj pentroarto, ŝi lernas la francan lingvon. Adreso: Lidia Skazyła, 21-001 Łuszczów 29 A, woj. lubelskie, Pollando.

18-jara lernanto interesigas pri turismo, fotoarto, kolektaĵojn postmarkojn (bildkartojn). Adreso: Robert Luniewski, Mieszka I 3 m 20, PL-15-054 Białystok, Pollando.

40-jara nova esperantisto laboras en la energetika institucio en Jelenia Góra, li interesigas pri turismo kaj literaturo, kolektaĵojn bildkartojn kaj turismajn prospektojn. Adreso: Lucjan Marciniak, Działiszów 203, 58-513 Działiszów, Pollando.

39-jara astronomo interesigas pri astronomio kaj muziko. Adreso: Andrzej Pilecki, ul. Katedralna 8, 14-530 Frombork, Poll.

22-jara instruistino interesigas pri muziko kaj turismo, ŝi ŝatas vojaĝi kaj danci. Adreso: Barbara Binięda, 87-207 Dębowa Łąka, woj. toruńskie, Pollando.



La ESPERANTO-KLUBO de PLOIESTI (Rumanio) sercas grupojn diverslandajn, kiuj kunagas lernante la lingvon, intersangante spertojn kaj ideojn, eble ankaŭ vizitonte unu la aliajn. Skribu al: S-ro Victor Gh. Zerbes,

Str. Laurilor nr 5. Bl 36 A Apt. 66, RO-2000 Ploiesti - 3 (Nord), jud. Prahova, Romania, Europa.

Jan J. Neumann, 3002 Naugatuck Ave., SAN DIEGO, CA, 92117-2527, USA, kolektaĵoj librojn, gazetojn, muzik-diskojn, PK, intersangas 8 mm video; korespondas per sonbendoj.

Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj sciigas: Pro teruraj financa stato kaj organiza problemoj ni sciigas ĉiujn niajn membrojn, aliajn e-istojn kaj E-instancojn, ke ekde la 1-a de januaro 1988 IAHE glaciigas sian agadon ĝis la 1990-a jaro. En la sama periodo plu ne aperados ankaŭ nia gazeto "Voco de handikapuloj". Tamen viajn urgajn informojn, eldonaĵojn kaj aliajn materialojn (pro kontinueco) IAHE-sekretario akceptas al adreso: IAHE, Školska 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

AEST - 88 en Poprad En la tagoj 3. - 5. 8. 1988 okazos en Poprad sub la montaro Altaĵ Tatroj faka konferenco pri "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" sub la titolo "Raciigo". La celo de la konferenco estas intersango de spertoj inter fakuloj kaj personaĵoj rilatoj.

- Traktataj temoj:
- 1) Komputiloj - iloj de raciigo: tekstprilaboro, maŝintradukoj, informaj sistemoj, retoj, sciencetnikaj kalkuloj, projektaj laboroj, grafiksistemoj, teorio de programado, sistemanalizo, automatigaj sistemoj.
 - 2) Raciigo de sciencetnikaj laboroj: automatigo kaj robotigo, raciigo en industrio, ofic-laboroj, konstruado
 - 3) Prognozistiko
 - 4) Terminologio (en Esperanto, lingvonormigo)
 - 5) Lingvo-planado kaj planlingvoj
- Informojn kaj aligilojn petu ĉe: Ing. Juraj Britka, Velká okružná 28, CS-010 01 Žilina, Ĉeĥoslovakio.

En la tagoj 6. - 12. 8. 1988 okazos en Žilina jubileaj 10-aj Turismaj Tagoj. Estas preparitaj tri tuttagaj piedekursoj en Malgranda Fatra k.a. Informojn sendas: Juraj Gondžúr, Levočská 3, CS - 010 08 Žilina, Ĉeĥoslovakio

INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO (HUNGARIO)
Hungara E-Junulara organizacio internacia
junularan ferian semajnon en sudhungar-
landa urbo Szeged inter 10-16-a de julio
1988, en la semajno tuj antaŭ la LJK.
La programo antaŭvidas noktan banejon,
bivakfajrojn, ekskursojn kaj aliajn dis-
trajn programojn, krome ankau seriozajn
programojn, kiel medioprotektado, poli-
tika forumo pri Hungario ktp. Dum la se-
majno oni logos en aparta ripozejo en
3-6-litaj cambroj, tuj apud la rivero
Tisza. Eblas tendumi per propra tendo.
Partoprenkotizo (logado, mangado, pro-
gramoj) de 1.700 ĝis 2.800 forintoj.
Junuloj el socialismaj landoj povas pa-
gi surloke en forintoj. Pliaj informoj
kaj aliĝiloj haveblas ĉe Hungara E-Ju-
nularo, Budapest, Pk. 193. M-1368, Hun-
gario.

Somera Esperanto-Familia Tendaro 1988
de la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto 1988
en tendejo O-86 en la regiono de Feld-
berg, GDR. Programo: migradoj tra la ar-
baro kaj lago-rica naturo, ekskursoj
(unu sipekskurso), vespera kunveno kun
prelegoj, kantoj, por infanoj ĉiuvespere
estas fabelhor. Kondicioj: memprizorgo
(tendo, mango). Informoj: Warner Pfennig,
Fohlenwinkel 13, Neubrandenburg, DDR-2000.

Trarigardo de Esperantaj filmoj.
Vojevodio Centro de Kulturo kaj Arto en
Wałbrzych informas vin, ke en la periodo
23-25 de septembro 1988 en la Kastelo
"Książ" okazos trarigardo de amatoraj
filmoj "Pol 8". Estas eble, ke en ĉi tiu
trarigardo partoprenu esperantaj filmoj
el diversaj landoj. Temoj de la filmoj
estas libere elektitaj. Povas esti video-
filmoj. Se vi volas, ke viaj filmoj par-

toprenu en ĉi tiu trarigardo, skribu,
oni sendos al vi la regulojn. La filmojn
oni devas sendi ĝis la fino de junio 88
al adreso: Vojevodio Centro de Kulturo
kaj Arto, ul. Piastów Ślaskich 1, 58-306
Wałbrzych, Poll. Se viaj filmoj kvalifi-
kigos al la finalo, oni invitos vin per-
sone partopreni la solenan disdonon de
la premioj, kiu okazos en la Kastelo.

La Xla ITREE 88
okazos de la 1-a ĝis la 6-a de oktobro
1988 en Antonshöhe, subdistrikto Schwar-
zenberg, GDR, sub la moto "Antauen por
Konstanta paco kaj amikeco". Al la "In-
ternacia Turisma Renkontigo de Esperan-
tistoj en Ercmontaro" kore invitas vin
la organizantoj: Esperanto-Asocio en
Kulturligo de GDR, subdistrikto Schwar-
zenberg, kaj la Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
baza organizaĵo Karlovy Vary.
Inter la kulturaj prezentaĵoj montros
ankau ĉeĥa folkloro grupo muzikan kaj
kant-programon. Oni projekcios diapoziti-
vojn el interesaj renkontigoj kaj aran-
gos ekskursojn kaj migradojn en la pito-
reska pejzaĝo de la Ercmontaro kaj aliaj
vidindaĵoj. Logado en bone ekipitaj hej-
titaj 2-3-litaj cambroj. Partoprenkotizo:
180 GDR-markojn sen autobusekskurso, 200
markojn kun autobusekskurso. Kontakta-
dreso: Rudolf Eichler, Hermann Matern Str.21
GDR 9430 Schwarzenberg. Vi povas skribi
ankau al: Miloš Bloudek, Vyšehradská 4,
Karlovy Vary.

Renkontigo de esperantistoj-mikologoj
(fungokolektantoj) okazos inter 23-a kaj
25-a de septembro 1988 en Košice kaj Po-
prad. Informojn peras: Slovakia Esperan-
to-Asocio, Sobotské nám. 6, 058 01 Po-
prad, Ĉeĥoslovakio.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str.10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉe-
hoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: K. Franc, J. Hanousek (grafika a-
rango), M. Malovec, J. Patera (respondeca redaktoro) kaj H. Štruncová. Presas OKP-6
Liberec. Transdonita al presejo 1988-03-31. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK
au 14 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA au
rekte al nia asocio.

STARTO - nepravideľný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1,
vydáváný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: K. Franc, J. Hanou-
sek (grafická úprava), M. Malovec, J. Patera (odpovědný redaktor) a H. Štruncová. Po-
voleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.1985. Tiskne OKP-6 Liberec. Pře-
dáno do tisku 31.3.1988. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povol-
len Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

Melo antaŭ tribunalo - krátké dílo s námětem ze
srbské historie Kĉs 12,-

Zofia Nalkowska: Medalionoj - povídky polské autorky
varují před hrůzami války. Kĉs 12,-

Paul Kuusberg: Somermeze - autobiografický román
z druhé světové války Kĉs 15,-

Arvo Valton: En fremda urbo - výbor povídek, mini-
atur a aforismů estonského autora. Kĉs 27,-

3) poezie

Petr Bezruč: Sileziaj kantoj - světoznámá sbírka
v překladu T. Pumpa, J. Kořínka a R. Hromady Kĉs 11,-

Otakar Bžezina: Konstruado en Alto - drobné dílko
v překladu T. Kiliana Kĉs 4,-

V. Nezval: El mia vivo - přeložil J. Vondroušek Kĉs 4,-

Kvarfolio - básně českých básníků-esperantistů
Karena, Rumlera, Urbanové a Vidmana Kĉs 4,-

Eli Urbanová: El subaj fontoj - básnická sbírka
známé české esperantské básnířky, členky Akademie Kĉs 16,-

Krylov: 111 fabloj - bajky ruského klasika Kĉs 15,-

Tutmonda sonoro - výbor z nejznámějších básnických
děl od nejstarších dochovaných památek až do součas-
nosti v překladu K. Kalocsaye. 2 díly Kĉs 178,-

Al abelujo ĝi flugas - sbírka veršů estonského
básníka, do esperanta přeložila Hilda Dresden. Kĉs 5,-

Endre Ady: La morto de la ĉielarko - vybrané básně
a články maďarského klasika Kĉs 29,-

Estona soveta poezio - antologie z děl estonských
básníků, do esperanta přeložila Hilda Dresden. Kĉs 8,-

Hasanagaino - úryvek ze srbochorvatské lidové balady
spolu s kritickou studií. Vydáno k 200. výročí jejího
prvního vydání. Kĉs 9,-

V. Beekman: Lumo de Orienta Eŭropo - sbírka veršů
talinského básníka Kĉs 5,50

Debora Vaarandi: Ventolume - verše estonské básnířky Kĉs 10,-

Asen Grigorov: Gardu la pacon! - verše bulharského
básníka, vydány v Budapešti. Kĉs 23,-

Per kanto al Esperanto - zpěvník, obsahuje známé
písně esperantské, polské a jiných národů Kĉs 25,-

4) historie

Meze de Eŭropo - přehled čsl. dějin Kĉs 15,-

Olomouc - průvodce městskou památkovou rezervací Kĉs 9,-

Objednávky vyřizuje: Český esperantský svaz, Jilská 10, 110 01 Pra-
ha 1, expedice tiskovin

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

**Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**